

# KONTAKTO

NUMERO 205 (2005:1)

ISSN 0023-3692



# ORGANIZAZIJOJ



Antaŭnelonge en mia urbo, Kievo, sufiĉe proksime al mia domo, oni volis konstrui domegon – tre modernan kaj plej altan en la tuta urboparto, kun subtera garaĝo kaj ĉiuj luksaĵoj (por deputitoj, komercistoj k.s. – por ordinaraj homoj ĝi estus ja tro kosta). Sed... oni ne konstruis ĝin. Pli ĝuste – la kvartal-loĝantaro simple ne permesis tion: homoj kolektiĝis kaj ne enlasis la buldozojn. Kial? Unue, ĉar tiu domego tute malkongruas kun la ĉirkaŭaĵo. Due, tio estus simple danĝera. Kontraŭ konstruado de la domego avertis interalie la plej estimataj arkitektoj, ĉar tiu loko situas tuj apud rivero, kaj la tero tie ne estas stabila. Do, la konstruado endanĝerigus la vivojn de ĉiuj kvartal-loĝantoj. En la batalo “registaro kontraŭ loĝantaro”, evidente, ĉi-foje gajnis la lasta (bedaŭrinde, ĉe ni tio okazas tre malofte...). Kaj nun la kievanoj penas kampanji kontraŭ la urbestrara decido anstataŭigi kutimajn (malmultekostajn kaj medi-amikajn) ŝtatajn tramojn per (pli kostaj kaj tute medi-malamikaj) busetoj. Io simila, cetere, okazis en Usono en la 1950-aj, kiam la tramoj malaperis el preskaŭ ĉiuj urboj, kaj anstataŭe venis busoj.

Nu, eble, tio estas tre eta kaj tute ne mondscale grava ekzemplo de tio, kion povas fari homoj kune. Komprenoble, ne ĉio, kion oni faras kune estas bona: estas amaso da malaj ekzemploj (rememoru kontraŭjudajn pogromojn...). Sed pri tio ni parolos iam poste.

La temo de tiu ĉi numero estas organizaĵoj, pli specife – neregistaraj (aŭ interregistaraj) bonfaraj kaj fratecaj organizaĵoj. Mi tre ĝojas, ke venis tiom da artikoloj – de esperantistoj kaj neesperantistoj el la tuta mondo! Pro la tiel multnombraj reagoj ni do decidis aperigi la ĉiujaran aldonajon (KAKTO-n) jam en la unua numero. Atendas vin artikoloj pri la frateca kaj mistika Ordeno de la Rozkruco (en kiu, interalie, membras nia vic-redaktoro Joel), pri skoltismo, pri kontraŭaŭta movado en Rusio, pri junulara federacio de abstinuloj, pri Ruĝa Kruco, pri “alternativa UN” kaj humanistoj. Legu ankaŭ interesan kaj nekutiman opinion pri organizoj en la rubriko “Opinie”. Eniris la numeron ankaŭ artikoloj ne rilataj al la ĉefa temo kaj – kiel ĉiam en la unua numero de la jaro – la listo de facilaj vortoj! Ni esperas, ke vi ĝuos la legadon same kiel ni ĝuis la preparadon de tiu ĉi numero.

Agrablan legadon!

## Jenja

P.S. Ne forgesu rekotizi/aboni por 2005 (se vi ankoraŭ ne faris) kaj atentu, ke ŝanĝiĝis la redakcia adreso – ja ekde aprilo mi loĝos en Usono (la KONTAKTO-adreso estos: 16800 Phillips Rd., Alpharetta GA 30004, Usono).

## <ENHAVO>

Ŝajne, ili ne ŝatas privatecon... Spertoj de esperantista instruisto de la angla en Ĉinio (Gabriele CORSETTI, Italio).....	3-4
Estu Preta! (Roberto RESENDE, Brazilo).....	4-5
Biciklistoj de ĉiuj landoj – amasiĝu! (Dmitrij KOKOREV, Rusio).....	6
“Kiam homoj trinkos nur glason da vino kun la vespermanĝo, ni estos feliĉaj!” (intervjuo kun Kristina Sperková, Slovakio).....	7
“Ankaŭ milito havas limojn...” (Joanna HOPKINSON, Britio).....	8
Cunamo: neniu malbono sen bono... (Rekha ABEL, Hindio).....	9
La Rozo sur la Kruco (Joel AMIS, Usono).....	10-11
Alternativa UN? Jes! (Trish KINCADE, Usono).....	12
Humanismo: por pli bona mondo! (Oksana BURKINA, Rusio).....	13
Mandarina revolucio en la lando Kranio (Jojo, Piklando/Mordio).....	14-15
Mi revas pri Kristnasko struta... aŭ: kiel mi fariĝis “vera ukraina viro” (Joel AMIS, Usono).....	16
La reveninta kuniklo (Luc GOUVERNEUR, Francio).....	16
Recenze, anonce.....	17
Opinie.....	18
Informe.....	19
Facilaj vortoj.....	20

### KONTAKTO-adreso ŝanĝiĝis!

Karaj! Ekde aprilo 2005 la KONTAKTO-adreso ŝanĝiĝas, ĉar – jes! – via redaktoro translokiĝas usonen. Bv. sendi viajn kontribuojn al la nova adreso: KONTAKTO, 16800 Phillips Rd., Alpharetta GA 30004, Usono. La ret-adreso restas la sama: <kontakto@tejo.org>. Se vi eksciis pri tio malfrue kaj jam sendis ion al la malnova ukraina adreso – ne timu, via letero ĉiukaze atingos min, sed kun ioma malfruo.

### Ĉu vi jam rekotizis?

Bv. senhezite rekotizi por ke via ricevado de KONTAKTO kaj TEJO Tutmonde ne ĉesu. Ne forgesu, ke, krom ricevado de la interesaj kaj informplenaj TEJO-revuoj, via membreco rajtigas vin ricevi rabaton je la partoprenkotizo de la IJK (kiu ĉi-jare okazos en Zakopane, Pollando!)! Memoru, TEJO estas via asocio - helpu ankaŭ vi ke ĝi restu forta kaj aktiva! Kontakto la Centran Oficejon aŭ aliĝu rete ĉe: <www.uea.org/alighoj>.

### Temoj de la venontaj numeroj de KONTAKTO. Kontribuu!

- 2005:2. FAMILIOJ (internaciaj geedziĝoj, denaskismo ktp.).
- 2005:3. CIVILIZACIOJ.
- 2005:4. TERORISMO.

#### Ni tre bezonas viajn kontribuojn! Kontaktu la redakcion!

Ni ankoraŭ ne findecidis pri la temoj de la postaj numeroj. Inter la provizoraj temoj estas jenaj: NATURO / BESTOJ; POLITIKO / MILITOJ / TUTMONDIĜO; FOTADO; LINGVOJ; MANGAĴOJ k.a. Skribu – tiu decido povas esti ja la VIA. Ekde la pasinta jaro KONTAKTO kunlaboras pri la projekto *Interkulturo* <www.interkulturo.net>. Kune kun la IK-teamo, KONTAKTO preparos artikolojn rilatajn al kultura diverseco, interkultura lernado, interkulturaj konfliktoj ktp. Viaj artikoloj / ideoj ĉi-temaj kaj ajnatemaj estas pli ol bonvenaj!

### GRATULE

**Gratulegon** al la vic-prezidantino de TEJO Sonja PETROVIĈ kaj iama TEJO-estrarano Hokan LUNDBERG okaze de la naskiĝo de



ilia filino Iva Kristin Gurli LUNDBERG la 3-an de decembro, 2004. Pri ŝia naskiĝo informis la plej prestiĝa serba taggazeto *Politika* la 15-an de decembro en artikolo “Esperanto kiel gepatra lingvo”. **Ĉion plej bonan** al vi, Sonja, Hokan kaj Iva, deziras la KONTAKTO-redakcio kaj la tuta legantaro!



# Estu Preta!

BADEN-POWELL estis tiel saĝa ke li antaŭvidis, ke skoltismo fariĝos tutmonda, kaj rimarkis la gravecon de Esperanto por la skoltoj. Alia, kiu rimarkis la samon, estis Avoto (A.W. THOMSON), kaj en 1918 li fondis la unuan internacian skoltan asocion: Skolta Esperanto-Ligo (la organo de SEL nomiĝas *La Skolta Mondo*, legu ĝin ĉe <http://ttt.esperanto.org/skolta/sm>).

Skoltoj havas siajn devizon, leĝon kaj promeson. Kiel multaj versajne scias, la skolta devizo estas: “Estu Preta!” aŭ “Ĉiam Preta!”. La Skolta Promeso jenas: “Je mia honoro mi promesas, ke laŭ mia povo mi plenumos miajn devojn al Dio kaj al mia Patrujo, mi ĉiam helpas aliulojn, kaj mi obeos la skoltan leĝaron”. Kaj jen la Skolta Leĝo: “1. Skolto estas fidinda. 2. Skolto estas lojala. 3. Skolto estas utila kaj helpema. 4. Skolto estas amiko al ĉiu kaj frato al ĉiu alia skolto. 5. Skolto estas ĝentila. 6. Skolto estas amiko de bestoj. 7. Skolto obeas ordonojn. 8. Skolto ridetas kaj fajfas malgraŭ malfacilaĵoj. 9. Skolto estas ŝparema. 10. Skolto pure pensas, parolas kaj agas”.

En skoltismo estas kelkaj sekcioj: Kastoroj\*\* (pli junaj ol 6-jaraĝaj; ne tre oftaj, tamen), Lupidoj (inter 7– kaj 10-jaraĝaj), Skoltoj (inter 11– kaj 14-jaraĝaj), Pliaguloj (inter 15– kaj 17-jaraĝaj), Roveroj\*\*\* (inter 18– kaj 21-jaraĝaj). Plenkreskuloj povas esti subtenantoj, instruantoj kaj skoltestroj. La verkoj de KIPLING, ĉefe *La Libro de la Ĝangalo*, estis uzataj kiel bazo de skoltismo. Ĝuste tiu ĉi libro donis al BADEN-POWELL la ideon pri Lupida movado.

La internaciaj skolt-tendaregoj ricevis la nomon Ĵamboreo\*\*\*\* (granda festo). Ĉi-januale en Argentino okazis la 12-a Tut-Amerika Ĵamboreo kun 13 mil

geskoltoj. Tie SEL eĉ havis propran budon! TEJO financis la partoprenon de Marcelo Daniel LUCERO, kaj la redaktoro de *La Skolta Mondo* propraŭse preparis taŭgajn materialojn (dek mil elegantajn kolorajn vizitkartojn, T-ĉemizojn de SEL, KD-ojn kun la verko *Pli Larĝaj Horizontoj* en ok lingvoj, koltukojn ktp.). Hans BAKKER sendis 100 ekzemplerojn de *Ĵamborea Lingvo*. Niaj ĉefaj laborantoj – Marcelo LUCERO kaj Fernando INOCENCIO – ne havis tempon ĝui la eventon: la gejunuloj ĉiutage venis amase al la SEL-budo por peti informojn kaj partopreni fulmkurson pri la lingvo. La plej altranga skolto en la mondo, D-ro MISSONI (la Ĝenerala Sekretario de la Monda Organizaĵo de la Skolta Movado, kiu fondiĝis post SEL) surpriziĝis, ke Esperanto ankoraŭ vivas, kaj poste deklaris: “Esperanto estas la lingvo de la skoltoj!”

Subite, pluvegis dum la tuta nokto. En la posta mateno ĉiuj budoj estis plenaj de akvo. Multo de la materialo perdiĝis, kaj ni trovis ankaŭ kelkajn ekzemplerojn de *KONTAKTO* sub la akvo. Sed niaj penoj ne estis vanaj – ankoraŭ nun Marcelo ricevas po pli ol 40 ret-mesaĝojn tage kun informpetoj kaj petoj pri la E-kursoj.

### Ili estis/as skoltoj:

Joel AMIS (*KONTAKTO*-vic-red.), Paul MACCARTNEY (pop-muzikisto), Neil ARMSTRONG (kosmonaŭto: la unua sur Luno), Bill GATES (multmilionulo), William AULD (Esperanto-verkisto), Harisson FORD (aktoro: Indiana Jones), Steven SPIELBERG (verkisto kaj reĝisoro), Barbara PIETRZAK (ĉef-redaktorino de Esperanta sekcio de Pola Radio), Hans BAKKER (Esperanto-aktivulo kaj mecenato), Reĝo Karlo Gustavo de Svedio, Lucille BALL (komediistino), John KENNEDY, Bill CLINTON (prezidentoj de



BADEN-POWELL

Usono), Laura BUSH (usona prezident-edzino), George MICHAEL (pop-muzikisto).

\* jen la unuaj du (originalaj) signifoj de la vorto “skolto”: 1) kavaleriano izolita, kiu esploris kaj observis por protekti sidantan trupon; 2) soldato elsendita por kolekti informojn pri la irota vojo, la ev. ĉeesto de malamikoj ktp. (N.PIV)

\*\* kastoro – besto (mamulo) el la ordo de ronguloj, kun plata vosto, vivanta ĉe riveroj (N.PIV).

\*\*\* rovero – venas de la angla “rover” – vagi (laŭ la *Konciza Etimologia Vortaro*; red. A. CHERPILLOD).

\*\*\*\* Ĵamboreo (de la angla *jamboree*) – vorto enkondukita de R. KIPLING, eble el iu hindia vorto (laŭ la *Konciza Etimologia Vortaro*; red. A. CHERPILLOD).

### <LEGu>

Pli detale – ĉe <http://ttt.esperanto.org/skolta>; la libro kun la kurso *Ĵamborea Lingvo* estas trovebla ĉe <http://ttt.esperanto.org/skolta/jl>



Komence de la 20-a jarcento...



...kaj komence de la 21-a

# Biciklistoj de ĉiuj landoj – amasiĝu!

Dmitrij KOKOREV (Indian')  
<rainbowwarrior@nm.ru>, Rusio

Rusiaj urboj estas regnoj, kie “vivas” sanktaj aŭtoj kaj malbonaj piedirantoj, kaj en tiu ĉi “sistemo” tute ne ekzistas loko por biciklistoj. Ni kredas, ke tiu ĉi situacio devas esti tute ŝangita, kaj do – agas!

La transporta situacio en rusiaj urboj, aparte en Moskvo, bedaŭrinde, tre malbonas. Nia registaro neniam proponas malpliigi aŭto-uzadon aŭ almenaŭ uzi aŭtojn nur kiam oni vere bezonas tion. Ekzemple, en la tuta mondo oni organizas Senaŭtan Tagon, sed – ne en Rusio (malgraŭ seriozaj trafikproblemoj en pluraj niaj urboj)... Ŝajnas ke la registaro agas laŭ la principo “urboj nur por aŭtoj”. Ĝi ripetas la erarojn de eŭropaj ŝtatoj, kies registaroj opinias, ke aŭtoj estas la sola maniero solvi transportproblemojn. Tamen, lastaj spertoj montras, ke tutlanda aŭtomobilizado estas la malĝusta vojo. Pro tio naskiĝis diversaj movadoj, kiuj batalas kontraŭ aŭtoj – por publika transporto, por starigo de piediraj zonoj (ekzemple, en Rusio tio estas la movadoj “Moskvanoj por trajno”, “Senaŭta Rusio” ktp.). Tio estas malfacila afero, ĉar en Rusio multaj traktas aŭton kiel ion sanktan.

Laŭ iuj kalkuloj, moskvanoj havas ĉ. 3 mil-

eksterurbe. Efektive, oni simple ne estimas biciklantojn kaj ne konsideras ilin egalrajtaj partoprenantoj en strata trafiko.

## FAKTE

La koncepto pri “krita maso” naskiĝis antaŭ pli ol 12 jaroj. La unuaj ĉi-rilataj agoj okazis en San-Francisko, Usono. Tiam kelkaj aktivuloj proponis al lokaj biciklistoj kunveni samloke kaj samtempe por poste kune bicikli tra la urbo. La ideo evidentiĝis tre sukcesa kaj samtempe tiel simpla kaj genia, ke post kelkaj jaroj tiu ĉi movado disvastiĝis tra la mondo. La nomo de la movado venas de la filmo de Ted White [ŭajt] *Return of the Scorcher* (Reveno de Skorĉer). Per tiu ĉi termino oni priskribis la situacion en Pekino, Ĉinio. Tie ĉe stratkruciĝoj ne estas trafiklumoj, kaj biciklistoj, por transveturi straton aŭ stratkruciĝon, devas atendi ĝis kolektiĝas “krita maso” – t.e. granda kvanto de biciklistoj, sufiĉa por bari aŭtotrafikon.

Antaŭnelonge (aprile 2004) la movado “Krita maso” (KM) aperis ankaŭ en Rusio. La ĉefa ideo de KM estas batali por la rajtoj de biciklantoj, montri al la urbestro kaj ĉiuj ceteraj, ke ekzistas homoj, ne kontentaj pri la nuna situacio kaj pretaj ŝanĝi ĝin. La biciklistoj volas tiamaniere rememorigi, ke ankaŭ ili rajtas uzi publikan spacon. La “nekontentuloj” klare sciigas, ke ili volas loĝi en urboj kaj ne timi, ke iam aŭto mortigos ilin. Por ili KM estas tre taŭga ŝanco renkontiĝi, montri ke ili amas la biciklon kaj preferas ĝin al la aŭto.

La unuaj provoj organizi KM-on en Rusio okazis jam antaŭ ĉ. du jaroj, sed sensukcese (tiam partoprenis maksimume 25 biciklistoj). Sed la tempo pasis, aliĝis al la movado ankaŭ kelkaj aliaj organizoj (ekzemple, naturprotektaj organizoj), kaj... jam la unuan fojon la nombro de partoprenantoj superis niajn atendojn – ni havis ĉ. 150 partoprenantojn! Krome, alvenis ĵurnalistoj, kaj poste aperis sufiĉe pozitivaj raportoj.

La sekva KM-ago okazis post du monatoj – por la Tago de Sendependeco (ni decidis nomi ĝin Tago de Aŭtosendependeco), kaj partoprenis eĉ pli da homoj ol en la unua fojo! La “alternativa festo” cetere okazis ne nur en la rusia ĉefurbo, sed ankaŭ en kelkaj aliaj urboj. Tie partoprenis malpli da bicik-



KOMPLEZE DE LA AŬTORO

Unu, du, tri... Ek!

listoj, sed tutegale la agoj havis evidentan sukceson.

KM-agoj tra la mondo estas tre malsamaj. Ankaŭ la nombro de partoprenantoj povas tre varii – foje okazas agoj kun kelkmil partoprenantoj (ekzemple, antaŭ 12 jaroj en San-Francisko kolektiĝis kvin mil [!] partoprenantoj). Kiel la afero aspektas en Moskvo? Kolektiĝas sufiĉe granda grupo kun diverskoloraj (foje strangaj) vestaĵoj, ŝercaj mesaĝoj, sloganoj kaj flagoj. Ĉiuj partoprenantoj senĉese sonoras, sirenas kaj diversmaniere bruadas. La kialoj partopreni povas esti diversaj: iuj volas batali por siaj rajtoj kaj montri siajn politikajn postulojn; aliaj simple volas montri la propran biciklon, renkontiĝi kun samideanoj, traveturi la urbon amase ktp.

Kiam en unu loko kolektiĝas samtempe multaj biciklistoj, naskiĝas tute alia formo de biciklado, kaj la kutima situacio plene ŝanĝiĝas. Tiam bicikloŝatantoj povas veturi tra la urbo kaj ne timi, ke iu freneza ŝoforo mortigos ilin. Dum tiu ĉi tempo oni povas por iom da tempo forigi “agresemajn aŭtojn”, kiuj kutime okupas la tutan urbon.

Interese, ke por organizi tiujn agojn ni, interalie, elspezis tre malmultajn fortojn. Plejparte ni uzis interreton – metis anoncojn en diversaj forumoj kaj proponis fari la samon en aliaj urboj. Krome, ni uzis afiŝojn, flugfoliojn, reklamis la agojn en biciklaj kluboj kaj inter geamikoj... Fakte, la organizantoj de agoj en iuj urboj eĉ ne estis konataj al siaj kolegoj el aliaj urboj!

Nun la KM-agoj estas regulaj; stabile kreskas ankaŭ la nombro de partoprenantoj. Multaj homoj aprobas la ideon de KM, helpas organizi aŭ simple mem aliĝas, sendas kuraĝigajn subtenmesaĝojn ktp. Tamen, bedaŭrinde, ne ĉio estas klara kaj senproblema – iam venas ankaŭ negativaj reagoj, foje eĉ de biciklistoj (nu, temas fakte pri homoj, kiuj posedas biciklon, sed uzas ĝin eksterurbe, en la urbo ili veturas per aŭto kaj ne konsideras biciklon transportilo). Eble, tio okazas pro tio, ke homoj simple ne pretas batali por la propraj rajtoj aŭ postuli ion de la registaro. Ili diras, ke tio estas politika afero, en kiun ili ne volas enmiksiĝi.



Kune – pli interese... kaj pli forte!

ionojn da bicikloj (entute en la urbo estas, laŭ malsamaj fontoj kaj kalkulsistemoj, de ok ĝis dek milionoj da enloĝantoj – Red.), sed en Moskvo ne ekzistas eĉ unu biciklovoĵeto (malkiel, ekzemple, en Nederlando). Ne ekzistas ĉe ni ankaŭ bicikloparkejoj kaj ebloj transporti biciklojn en publika transporto. Ĝuste pro tio la plejmulto da moskvanoj ne uzas biciklojn en la urbo. Kutime oni eĉ ne konsideras biciklon transportilo – por multaj ĝi estas simple amuzilo por foje veturi



Kristina Šperková

# “Kiam homoj trinkos nur glason da vino kun la vespermanĝo, ni estos feliĉaj!”



Kaj oni ankoraŭ diras, ke ni estas porkoj...

Kun la junaj bon-templanoj mi kun la vic-redaktoro konatiĝis dum la seminario pri projektmastrumado, komune organizita de TEJO kaj EGYTF\* [egtif] – European Good Templar Youth Federation – Eŭropa Federacio de Junaj Bon-Templanoj. La seminario pasis bonege, kaj la sola plendeto de unu el la partoprenantoj TEJO-flanke estis pri la “malpermeso trinki bieron”. Nu, la plendeto estis evidente ŝerca, sed tamen neuzado de alkoholo estis kondiĉo de par-

topreno. Kial? Ĉar EGYTF estas organizo, kiu tute kontraŭas alkoholuzadon kaj ĉiujn drogojn. Via sci-volema redakto-teamo, kompreneble, ekvolis intervjui kaj ekscii pli pri ĝi! Joel aparte interesiĝis pri eventualaj templanaj ligoj, Ĵenja – pri kulturaj diferencoj rilataj nedrinkadon. Kaj jen la rezultoj! Demandojn de *KONTAKTO* respondas Kristina ŠPERKOVÁ, unu el la kunorganizantoj de la seminario.

– De kio originas la nomo EGYTF? Ĉu estas ligo al mezepokaj templanoj kaj se jes, kia?

– EGYTF estas la junulara sekcio de IOGT (*International Order of Good Templars* – Internacia Ordeno de Bon-Templanoj). En sia nuna formo EGYTF ekzistas ekde 1990. IOGT estis fondita en 1851 en Utica [jutica] (Novjorkio), Usono. Ĝia fondkialo estis la granda kvanto de alkoholkonsumado, kiu paralizis la socion. Do, ne estas rekta ligo al la mezepokaj templanoj, sed ja estas komuna trajto: frateco. Bon-templanoj kreis frataron, en kiu ĉiuj homoj estis egalaj kaj en kiu ĉiu povis membriĝi, senkonsidere al religio, raso, politiko aŭ eĉ sekso – virinoj povis membriĝi kaj eĉ voĉdoni! (cetere, nur komence de la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento estis akceptita amendo al la usona konstitucio por rajtigi virinojn en Usono voĉdoni por prezidento – Red.). Plia celo estis persvadi homojn abstini de alkoholkonsumado kaj doni subtenon al resaniĝantaj alkoholuloj. IOGT-anoj rigardis alkoholon kiel obstaklon al soci-evoluo, malhelpo al klerigo kaj kaŭzon de konfliktoj.

– Kio estas la filozofia bazo de la kontraŭdroga sinteno de la organizo? Ĉu ĝi havas (aŭ havis) religiajn radikojn?

– Tute ne. La ĝenerala ideo de la organizo estas kunigi homojn de la tuta mondo senkonsidere al ilia religio, haŭtkoloro, politikaj opinioj ktp. La celoj de EGYTF estas paco kaj homa digno, libereco, demokratio kaj egaleco, kaj ni konsideras alkoholon obstaklo al tiuj ĉi celoj. Alkoholo malhelpas lernadon, kaŭzas aŭtoakcidentojn, familiajn kaj aliajn sociajn problemojn, kaj ĝi neniam solvis ajnajn problemojn. EGYTF konsideras alkoholon malhelpo al soci-disolvolvo kaj bonaj sociaj rilatoj kaj pro tio ni kontraŭas ĝin. Plena abstino de alkoholo kaj aliaj drogoj estas la plej bona maniero propagandi sendrogan vivmanieron. Tio estas pruvo, ke vivo

sen alkoholo kaj aliaj drogoj eblas kaj povas esti eĉ amuza (*ridetas*).

– Sed ĉu la insisto pri plena abstino ne prezentas kulturajn malfacilaĵojn en iuj landoj? Ekzemple, kiam franco (italo ktp.) trinkas glason da vino kun la vespermanĝo estas unu afero, kaj kiam usona (ukraina ktp.) studento trinkas pli ol dek bierojn nur por ebruĝi estas tute alia afero, ĉu ne?

– Ni ne admonas homojn entute ne drinki, sed membroj de EGYTF ja tute ne drinkas – tio estas la vivmaniero, kiu plej taŭgas al niaj idealoj. Ni konsideras alkoholon drogo, kaj se ni volas propagandi sendrogan vivmanieron, ni devas unue mem vivi tiel. Se ni nur iom drinkus, aliaj demandus: “Kie estas la limo? Kaj kial vi metis ĝuste tiun limon?” Kompreneble, estas ja diferenco en via ekzemplo, sed restas la fakto, ke la nombro de la homoj, kiuj mortas pro alkoholo estas multe pli granda en Francio. Oni vidas la situacion malsame, ĉar oni rigardas ĝin nur sur la surfaco – ekzemple, en Francio oni ne konsideras alkoholon tiel danĝera, kiel ĝi vere estas, ĉar ĝi estas parto de la kulturo. Cetere, estas pruvite de sciencistoj, ke alkoholo estas unu el la plej danĝeraj drogoj pro ĝia malrapida kaj subtila efiko... Se la socio finfine atingos la punkton, kiam homoj trinkos nur glason da vino kun la vespermanĝo, ni estos feliĉaj (*ridetas*).

– Kiel EGYTF kaj IOGT disvastiĝis tra la mondo? Kial EGYTF estas pli forta en iuj landoj (Skandinavio, ekzemple) kaj malpli forta en aliaj?

– Kiel mi jam diris, IOGT, estis fondita en Usono, sed ĝi rapide disvastiĝis al Kanado, Anglio kaj Skandinavio. En tiuj landoj jam ekzistis moderecmovadoj, kiuj kontraŭis fortajn alkoholaĵojn, sed toleris vinon, bieron ktp. IOGT-anoj siavice estis plen-abstinuloj; krome, ili organizis studrondojn, kulturaktivajn kaj diskutojn ne nur pri alkoholorilataj

temoj, sed ankaŭ pri filozofiaj kaj politikaj temoj. La movado estis enorma kaj havis sekciojn por gejunuloj kaj infanoj. Pro tio la skandinava landoj estas tiel amase reprezentitaj en EGYTF. Ja iuj landoj havis firman bazon jam en la 19-a jarcento, dum en aliaj eŭropaj landoj neniam estis IOGT-sekcioj aŭ ili aperis multe pli poste. La alia kialo estas soci-kultura. Iuj landoj estas laŭvorte nomataj “drinkantaj socioj”, kie drinki estas tradicie kaj rifuzi alkoholon estas eĉ malĝentile. Landoj, kie EGYTF ne estas reprezentita, estas plejparte okcidenteŭropaj landoj – Francio, Belgio, Nederlando, Hispanio, Portugalio. Tre mankas al ni Okcidenta Eŭropo...

Nun ni havas ĉ. 12 mil membrojn kaj tiu nombro estas pli-malpli stabila. Ni havas 26 sekciojn en 20 eŭropaj landoj. Svedio kaj Norvegio estas la plej aktivaj landoj laŭ memborkvanto.

– Kiajn strategiojn EGYTF uzas por varbi novajn membrojn? Ĉu oni uzas malsamajn strategiojn en malsamaj landoj/kulturoj?

– Ni varbas plejparte per diversaj aktivajtoj – invitas gejunulojn al niaj seminarioj, tendaroj, diskutoj ktp. Kiam mi unufoje partoprenis EGYTF-eventon, mi tute ne sentis, ke tio estas la unua fojo: ĉiu estis amikema kaj akceptis min tia, kia mi estas. Tiu sento estas neforgesebla kaj inspira!

EGYTF, efektive, estas federacio de organizaĵoj, kaj ĉiu organizaĵo estas libera utiligi la varbmanierojn, kiuj plej efikas en la koncerna kulturo. Sed unu el la plej efikaj strategioj en ĉiuj organizaĵoj estas viziti lernejojn por paroli al lernantoj, ludi ludojn kaj multe diskuti.

– En niaj Esperanto-organizaĵoj, same kiel en multaj “membro-kotizaj” organizaĵoj, ni ĉiam havas la problemojn ne nur varbi, sed ankaŭ teni membrojn. Ĉu EGYTF havas la saman problemon?

– Ankaŭ nia membraro “cirkulas”. Membroj pliaĝiĝas kaj havas aliajn

interesojn, do ili forlasas EGYTF-on – sed novaj membroj venas. Tre bona afero estas, ke kiam iu ne plu sentas sin junul(in)o, li/ŝi simple aliĝas al IOGT. Mi pensas, ke la plejmulto de la homoj, kiuj jam decidis ne drinki kaj estis membroj de EGYTF, estos membroj de ĝi ĉiam, almenaŭ en la koro.

Teni membrojn signifas ĉiam elpensi ion interesan. Laŭ mi, niaj seminarioj kaj tendaroj estas tre “kontaktaĵaj”, kaj reveni hejmen post semajno kun novaj geamikoj ne estas facile... kaj larvoj verŝiĝas. Esti membro de EGYTF signifas denove renkonti tiujn homojn (*ridetas*).

Kompreneble, ne ĉiuj 1200 membroj povas partopreni en seminarioj, do, tiurilate estas la tasko de la landaj sekcioj teni membrojn. Ili faras la samon – kreas amikan kaj sekuran etoson, kie oni ne timas “esti si men” kaj esprimi sin. EGYTF kaj ĝiaj sekcioj ne okupiĝas nur pri abstinado – esti en EGYTF signifas renkonti novajn homojn, esti kun geamikoj, lerni novajn aferojn kaj persone evolui.

– Ĉu iu, kiu loĝas en lando, kie ne estas EGYTF-filio, povas aliĝi al EGYTF? Se jes, kiel?

– Jes, eblas. Ni estus tre feliĉaj trovi novajn membrojn en tiuj landoj. Se oni interesiĝas, oni povas kontakti nian oficejon <office@egtyf.org>. Li/ŝi povas aliĝi al sekcio en la plej proksima lando (depende de la loko) aŭ fondi novan EGYTF-sekcion. Kaj la EGYTF-oficejo helpas pri tio!

Ĉi tie mi deziras saluti ĉiujn esperantistojn kaj diri, ke se al iu ekplaĉas la ideojn de EGYTF, estas tre facile kontakti nin kaj membriĝi. Eble post kelkaj jaroj ankaŭ EGYTF parolos Esperanton! (*ridetas*).

Intervjuis Ĵenja ZVEREVA kaj Joel AMIS (el la angla trad. Joel AMIS)

\* la seminario okazis en oktobro 2004 en Strasburgo (pli detale – en TEJO Tutmondo 2004:5)

Por pliaj detaloj pri EGYTF vizitu <www.egtyf.org>.





Pli ol 260 mil mortintoj kaj pli ol 14 mil malaperintoj... Tia estas la “rikolto” de unu el la plej teruraj naturkatastrofoj en la tuta historio de la homaro – cunamo en Sud-Orienta Azio... Multaj miloj da registaraj kaj neregistaraj organizoj kaj individuoj engaĝiĝis en help-kampanjon. Ankaŭ la Ruĝa Kruco estis unu el tiuj, kiuj tuj komencis aktive helpi – kaj per laboro de siaj aktivuloj, kaj per kolektado de mono.

*Joanna HOPKINSON, Brita Ruĝa Kruco (Kunordiganto de Internacia Junulara Volontulado), Britio, speciale por KONTAKTO; Jenja ZVEREVA, Ukrainio*

## Pli aĝa ol Esperanto

La Ruĝkruca Movado estiĝis antaŭ pli ol 135 jaroj; ĝia fondinto estas sviso Henry DUNANT [anri dunan]. Konsternite de la suferado de miloj da homoj sur la batalkampo apud Solferino\* – ili mortis simple pro plena neglekto, – li proponis fondi naciajn help-societojn de volontuloj. Laŭ DUNANT, la volontuloj devas esti trejnitaj en pacaj tempoj

# “Ankaŭ milito havas limojn...”

unu Nobel-premiito. Malgraŭ tio, ke li tiam loĝis en svisa malriĉulejo, li fordonis la tutan monon por bonfaraj celoj... La Ruĝkruca Movado poste ricevis tri pliajn Nobel-premiojn pri paco – en la jaroj 1917 kaj 1944 (pro ties agado dum la du mondmilitoj) kaj en 1963, la jaro de ĝia centjariĝo.

## Ruĝa kruco: tri en unu

Nuntempe la Internacia Movado de la Ruĝa Kruco kaj Ruĝa Krescento (ofte oni nomas ĝin simple “la Ruĝa Kruco”, “la Ruĝa Krescento” aŭ “la Ruĝa Kruco kaj Krescento”) estas la plej granda bonfara helpreto en la mondo, kies filioj estas en preskaŭ ĉiu lando. La movado konsis-

nur la homama misio ĉiel helpi kaj protekti la vivojn kaj dignon de viktimoj de militoj (internaj kaj eksteraj militaj konfliktoj ktp.). Ĝi direktas kaj kunordigas internaciajn help-agadojn, iniciatitajn de la Ruĝkruca Movado en konfliktaj lokoj. “Eĉ militoj havas limojn” estas la principo de la organizo. La agado de la IKRK baziĝas sur internacia homama leĝaro, kies bazo estas la Ĝenevaj Konvencioj subskribitaj de 192 landoj. Laŭ tiuj dokumentoj, vunditoj kaj malsanuloj sur la batalkampo ne estu rigardataj kiel malamiko; la Konvencioj deklaris ankaŭ la neŭtralecon de kuracistoj kaj flegistoj.

La Internacia Federacio de Societoj de la Ruĝa Kruco kaj Ruĝa Krescento <[www.ifrc.org](http://www.ifrc.org)> (fondita en 1919) estas la plej granda internacia bonfara organizo, kiu donas helpon senkonsidere al nacieco, raso, religio, klaso aŭ politikaj opinioj. Malsimile al la Ruĝkruca Komitato, kiuj zorgas pri militaj viktimoj, la celo de la Federacio estas multe pli vasta. Ĝi okupiĝas pri viktimoj de naturaj katastrofoj, ekstrema malriĉeco ktp., helpas al rifuĝintoj kaj viktimoj de sankrizoj. La Federacio antaŭenigas homamajn valorojn, respondas al katastrofoj kaj provas preventi ilin, zorgas pri la sano kaj normala vivo de la homo. Alia grava tasko de la Federacio estas plifortigi siajn naciajn societojn.

*Naciaj Societoj de la Ruĝa Kruco kaj Ruĝa Krescento* helpas la registarajn funkciojn en la kampo de homamaj aferoj kaj donas tutan aron da servoj, kiel katastrofhelpo, sanaj kaj sociaj programoj. Dum militoj, la naciaj societoj organizas medicinan helpon.

## Brita Ruĝa Kruco

La Brita Ruĝa Kruco estas unu el la plej grandaj kaj aktivaj naciaj societoj de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco: nur en la jaro 2003 ĝi trejnigis 172 mil homojn pri urĝa medicinhelpo kaj donis urĝan helpon al homoj en 14 300 kazoj. En la help-kampanjon

### FAKTE

La simbolo de la Ruĝa Kruco estas metata sur bonfarajn kaj kuracdonajn veturilojn kaj konstruaĵojn laŭ la Konvencioj de Ĝenevo, por protekti ilin de milita atako. (Oni ne konfuzu la Ruĝan Krucon kun la kruco de Sankta Georgo, kiu estas la flago de Anglio, Barcelono, Freiburg [frajburg] ktp.; la kruco de Sankta Georgo etendiĝas ĝis la rando de la flago).

Komence oni uzis nur la Ruĝan Krucon kiel simbolon de la Konvencioj de Ĝenevo, sed kelkaj islamaj nacioj (ĉefe la Otomana Imperio, nun Turkio) kontraŭstaris tion, kaj tiel estis enkondukita kroma simbolo – la Ruĝa Krescento. Poste, Persio (nun Irano) sukcese aldonis al la listo de uzeblaj simboloj alian simbolon – ruĝan leonon kun suno (t.e. simboloj de Persio); nun Irano ne plu uzas tiun simbolon, preferante la Ruĝan Krescenton, sed ĝi rezervis la rajton reuzi ĝin iam laŭ sia volo.

Tiam ankaŭ Israelo petis aldoni al la simbolaro la Ruĝan Stelon de Davido, rezonante, ke oni agnosku ankaŭ judan simbolon, krom la kristana kaj islama. (La Israela Ruĝa Kruco uzas tiun ĉi simbolon, sed sub internaciaj homamaj leĝoj oni oficiale ne agnoskas ĝin.) La Movado de la Ruĝa Kruco respondis, ke se oni donus sian simbolon al iu ajn alia grupo, multaj pliaj grupoj petos enkonduki siajn proprajn simbolojn, ĉu religiecajn aŭ ne. Tio ja malhelpas al la originala celo de la ruĝkruca simbolo – krei unu simbolon por indiki protektendajn veturilojn kaj konstruaĵojn. Responde, la Movado de la Ruĝa Kruco nun prilaboras novan nereligiecan simbolon\*\*, kiu estu facile rekonebla sur la batalkampo. (laŭ Vikipedio).

speciale por doni neŭtralan kaj senpartian helpon al suferantoj de militoj. Li proponis, ke ĉiuj landoj akceptu internacian interkonsenton, kiu rekonu specialan statuson de medicinaj servoj kaj tiun de la vunditaj sur la batalkampo. Tiu interkonsento – la Ĝenevaj Konvencioj – estis akceptita en 1864, kaj la jaro 1863 estas konsiderata la naskiĝjaro de la Ruĝa Kruco. En 1901 Henry DUNAN fariĝis la

tas el la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (IKRK) kaj la Internacia Federacio de Societoj de la Ruĝa Kruco kaj Ruĝa Krescento (FSRK) kun ties naciaj societoj en 181 landoj. Tiuj ĉi organizoj havas similajn celojn, sed malsamajn statusojn, kaj neniu estas super la alia.

La Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco <[www.icrc.org](http://www.icrc.org)> (fondita en 1863) estas senpartia, neŭtrala kaj sendependa organizo kun



en Sud-Orienta Azio la Brita Ruĝa Kruco aktive engaĝiĝis jam en la unua tago de la katastrofo. Ĝi kolektis pli ol 13,8 milionojn da pundoj de help-mono (entute la Ruĝa Kruco kolektis 1,17 miliardojn da usonaj dolaroj, 85% donis privataj homoj kaj organizoj), sendis plurajn spertulojn (ekde medicinistoj ĝis specialistoj pri transportado), organizis plurajn helpflugojn al Srilanko,

Indonezio kaj Maldivoj. Krome, ni funkciigis helpan telefonservon por homoj, kiujn trafis la katastrofo, kaj aranĝis psikologian helpon por miloj da revenintaj turistoj en la ĉefaj londonaj flughavenoj. Ankaŭ nun la Brita Ruĝa Kruco daŭre sendas siajn spertulojn en tiujn partojn de Azio, kiuj plej suferis.

Jim [ĝim] ROBERTSON, 47-jaraĝa volontulo el Skotlando, estis unu el tiuj, kiuj alvenis al Maldivoj jam la duan tagon post la cunamo, la 27-an de decembro. Li helpis efektivigi help-programojn pri akvo, sano kaj ŝirmejoj. “Kompare al aliaj landoj de la regiono, sur Maldivoj ne estas grandega neceso de manĝaĵoj kaj aliaj rimedoj, kaj tio ebligas esperi pri sufiĉe rapida rebonstatigo. Plejparte ni laboras en la sudaj kaj centraj insuloj, kiuj suferis plej multe – nia ĉefa tasko estas helpi al virinoj kaj infanoj, kiuj restas sen subteno de siaj parencoj kaj amikoj”. Maldivoj estas unu el malmultaj landoj de la mondo, kie ne ekzistas nacia societo de la Ruĝa Kruco: “La unua afero, kiun faras la ruĝkrucaj volontuloj, estas kontakti iliajn lokajn kolegojn de la naciaj societoj. Ĉi tie ni devis rapide starigi laborrilatojn kun la registaro kaj varbi homojn, kiuj volus esti niaj volontuloj”, – daŭrigis Jim.

Alia teamo de la Brita Ruĝa Kruco okazigis en Tajlando post-traŭmatan helpon kaj helpon al homoj, kiuj perdis proksimumojn en la katastrofo. La teamo kunlaboras kun la Brita Ambasadego, kaj unu el ĝiaj taskoj estis ankaŭ trejni ambasadejajn laborantojn – ili ja ne kutimas labori en tiaj teruraj situacioj...

“Ili rakontadis al mi, kiel ili penis spiri en la ĉambro plena de akvo, pensante, ke baldaŭ ili dronos. Poste la muroj falis, kaj la akvo forportis ilin. Ni sidas apud homoj, dum ili ploras. Estas tre grave simple aŭskulti ilin...” – rakontis doktorino Sarah DAVIDSON, psikologo de Brita Ruĝa Kruco post reveno al Britio el Tajlando – ankaŭ ŝi estis unu el la unuaj, kiuj iris en la regionon. Ŝi aldonis, ke ŝi estas ege impresita, kiel homoj – ĉu trejnitaj aŭ ne – helpis unu la alian...

\* la batalo apud Solferino (norda Italio) okazis la 24-an de junio 1859

\*\* efektive, kruco tute ne estas nur kristana simbolo – oni trovas ĝin en diversaj formoj preskaŭ en ĉiuj kulturoj kaj multaj religioj kaj filozofioj. Krome, ĝi estas multe pli antikva ol kristanismo; pli detale pri la historio de la kruco legu en unu el la venontaj numeroj – Red.

Trad. de la angla Ĵenja ZVEREVA.



Rekha ABEL  
<rabel@crshyd.org>, Hindio,  
Tamil Nadu (speciale por  
KONTAKTO)\*

La 26-a de decembro 2004 estas la tago, kiu vivos en la memoroj de miloj da homoj tra la mondo – ĝi ja estis la tago, kiu enigis la vorton *cunamo* en la ĉiutagan uzon... Tiu tago ŝanĝis la vivojn de centmiloj da homoj en Azio. En Hindio la nombro de mortoj estis modesta kompare al Indonezio, sed la ĥaoso, kiun ĝi kreis, estas enorma. Jen faktoj de nur unu el la hindiaj ŝtatoj – Tamil Nadu:

- 128 000 familioj suferis pro la cunamo;
- 1500 infanoj perdis gepatron;
- 460 infanoj orfiĝis;
- 417 vilaĝoj estis trafitaj;
- 71 000 kabanaj estis trafitaj;
- 660 kilometroj da ŝoseoj difektitaj aŭ rompita;
- 87 milionoj da homoj suferis ĉu rekte ĉu nerekte;
- 381 tendaroj starigitaj;
- 371 000 homoj en tendaroj aŭ provizoraj loĝejoj;
- 15 000 katamaranoj perditaj;
- 32 000 fiŝkaptaj retoj perditaj;
- 7000 motorboatoj perditaj;

## Cunamo: neniu malbono sen bono...

– vorkaro\* kaj posedaĵoj valorantaj 35 000 da rupioj (614 milionoj da eŭroj) difektitaj.

Nun ĵurnaloj kaj televidkanaloj daŭre aperigas raportojn pri la cunamo, tamen multe malpli ofte. Pro la cunamo internaciaj helporganizoj ekkoncentris siajn atenton kaj fortojn sur ŝtatojn, kiel Tamil Nadu, Kerala, Andhra Pradeŝ kaj Andamana kaj Nikobara insularojn. Ĉi tiuj ŝtatoj – krom la Andamana kaj Nikobara insularoj – estas konsiderataj la pli evoluintaj ŝtatoj de Hindio de preskaŭ ĉiuj instancoj. Nuntempe en ĉi tiuj ŝtatoj baziĝas pluraj helpinstancoj.

Ene de 24 horoj de la okazaĵo, pluraj help-instancoj estis jam surloke taksante kaj subtenante lokajn help-klopodojn. Oni povis akuzi la registaron de Hindio pri neentuziasma reago al help-proponoj

de donantaj landoj. Tamen necesas diri, ke ĝi tre bonvenigis subtenon de internaciaj ne-registaraj organizoj (INRO-oj), kiuj jam ĉeestas en la lando kaj kunlaboras kun lokaj NRO-oj. En Tamil Nadu estas starigitaj NRO-kunordigaj komitatoj, prezidataj de registara oficisto, kiu respondecas pri la regiono. Tio ĉi estas la forumo por reviziado kaj planado.

La plej frapa fakto pri tiu ĉi krizo estas la spontana elverŝado de subtenproponoj – financaj, materialaj kaj homaj – el la tuta mondo. Post la ĥaoso de la komenca reago, helpinstancoj malrapide ekas formuli planojn – ĉu longdaŭrajn aŭ mallongdaŭrajn, ĉu komunume aŭ infrastrukture baziĝintaj. La defio, kiun ni (tiuj el ni, kiuj laboras en INRO-oj) alfrontas nun, estas certigi kunordigitan

reagon. Ni devas certigi ankaŭ ke la facila disponeblo de mono ne deturnu nian atenton de prioritatoj, kiuj ekzistis antaŭ la cunamo kaj pro kiuj ni estas en la lando. Ĉi tie mi celas problemojn de sociala justeco, kiujn la grandeco de la katastrofo povas facile superombri. Ĉu la cunamo povas esti ŝanco por efektivigi socialajn ŝanĝojn?

\* vorko – grava konstruaĵo (aŭtovojo, ponto, tunelo k.s.) (N.PIV).

La aŭtorino de tiu ĉi artikolo laboras por la internacia helporganizaĵo *Catholic Relief Services* [katolik rilif servis] (CRS) – Katolika Help-Servo.

El la angla trad. Joel AMIS

FAKTE

La indonezia tertremo (magnitudo 9 laŭ la RICHTER-skalo) estas jam la kvina inter la plej grandaj tertremoj ekde la jaro 1900. Similgrandaj tertremoj okazis en Ĉilio (la 22-an de majo 1960, magnitudo 9,5), Usono, Alasko (la 28-an de marto 1964, magnitudo 9,2 kaj la 9-an de marto 1957, magnitudo 9,1) kaj Sovetunio, Kamĉatko (la 4-an de novembro 1952, magnitudo 9). Ankaŭ ili kaŭzis cunamojn, tamen antaŭe estis multe malpli da viktimoj pro tio, ke la centroj de la tertremoj estis je granda distanco for de loĝlokoj. Ankaŭ la loĝdenseco en tiuj regionoj estis multe malpli granda ol en Sud-Orienta Azio.

Laŭ la datumoj de la informagentejo *Regnum*, specialistoj el Rusio (kaj aliaj landoj) sciis pri la tertremo kaj eventuala cunamo antaŭe. Kiel diris docento de rusia seismologia universitato V. Bokov, la informoj pri tio estis publikigitaj sur speciala retpaĝo, sed, verŝajne, ili ne estis uzitaj (iuj informfontoj eĉ diras, ke la registaro de kelkaj sud-orientaj landoj sciis pri la cunamo, sed ne uzis atentigojn por “ne fortimigi turistojn”)... Laŭ aliaj specialistoj, la kialo de tiom da viktimoj estis ne malĝusta prognozo, sed manko de internacia informosistemo pri eventualaj katastrofoj (tiajn sistemojn havas kaj sukcese uzas, ekzemple, Usono kaj Japanio). Konsiderante la rapidecon de la cunam-moviĝo, la ondo atingis la bordon de Sumatro 10-15 minutojn post la tertremo, Srilankon – proksimume post du horoj, sud-orientan Hindion – tri horoj post de la tertremo. Do, se funkcius la informosistemo, estus eble eviti tiom da viktimoj. “En Orienta Siberio homoj ekde infanaĝo scias, ke kiam abrupte malaperas akvo de la bordoj, oni devas kiel eble plej rapide forkuri. Sed turistoj, kiuj ripozis ĉe la Hinda Oceano, komencis kolekti konkojn”, – diris A. GRABOVSKI, la ĉefo de la Centro pri Meteologio kaj Esploro de la Ĉirkaŭa Medio, Rusio (Sankt-Peterburgo).

# La Rozzo Si



Lordo Francis BACON, Imperatoro de la Ordeno en la 17-a j.c.

Joel AMIS, Usono

**La vortoj “rozkrucismo” kaj “Rozkruca Ordeno” jam de jarcentoj inspiras la imagojn de verkistoj, polemikistoj kaj sensaciemaj konspirteoriistoj – simile kiel la vorto “framasonismo”. Sed kio vere estas la Rozkruca Ordeno<sup>1</sup>?**

La Rozkruca Ordeno – konata internacie sub la siglo AMORC [amork] (latine *Antiquus Mysticusque Ordo Rosae Crucis* – Antikva kaj Mistika Ordeno de la Rozkruco) – estas internacia filozofia, inica kaj tradicia organizaĵo, kiu gardas kaj daŭrigas la esoteran mistikan scion, kiun inicitoj transdonas jam de antikvaj tempoj. La Ordeno helpas homojn esplori la misterojn de la vivo, pli profunde koni sin mem, vivi en pli granda harmonio kun la Kosmo kaj aliaj homoj, kaj ekkoni la naturajn leĝojn kaj principojn necesajn por fariĝi *majstroj en la Sankta Templo* (fizika korpo) kaj *laborantoj en la Dia Laboratorio* (Naturo). AMORC estas nek religia nek politika organizo – ĝian membraron konsistigas viroj kaj virinoj de la plej diversaj religioj, politikaj ideologioj, filozofioj, rasoj, naciecoj kaj vivmanieroj.

La nomo “rozkruca” devenas de la oficiala simbolo de la Ordeno, rozo sur kruco. La rozkruca kruco ne estas religia simbolo kaj neniel rilatas al la kristana kruco – efektive, la krucosimbolo estis uzata jam dum jarcentoj antaŭ la apero de kristanismo, i.a. en Egiptio (la Eklezio ne adoptis la krucon oficiale ĝis la 4-a j.c. – la simbolo de prakristanoj estis fiŝo). En rozkrucismo, la kruco reprezentas la fizikan homkorpon, dum la rozo reprezentas la disvolviĝantan animon. Do, la rozkruca simbolo klare ilustras la esencan duecon de la homo kaj la iom-post-ioman evoluon de la homa animo.

## Historio de la Ordeno Antikvaj originoj

Kiel la vorto “antikva” en AMORC sugestas, rozkruca filozofio havas siajn originojn en la antikvaj misterskoloj – pli precize, en tiuj de antikva Egiptio. En la misterskoloj, kleraj mistikuloj kunvenis por esplori kaj studi la misterojn de la universo, la naturo kaj la homo. Komprenoble, pro la seriozeco de la aferoj studataj oni severe ekzamenis kandidatojn antaŭ ol enlasi ilin. Dum la komencaj jarcentoj ĉi tiuj misterskoloj evoluigis sistemojn de inicado – tiel ke kun la progreso de la studoj, studentoj estis inicitaj en laŭgrade pli altajn gradojn de mistika scio. Ĉi tiuj inicitoj estis pli-malpli ritaj dramoj, kiuj vivece bildigis esoterajn principojn al la studentoj.


Ĉirkaŭ la jaro 1500 a.K. faraono Tutmosis la Tria unuigis la diversajn egiptajn misterskolojn en unu ordenon kun komuna regularo. Ĉirkaŭ jarcenton poste, faraono Amenhotep la Kvara estis inicita en ĉi tiun sekretan ordenon.

La esoteraj instruoj kaj idealoj tiel inspiris la faraonon, ke li oficiale kaj publike proklamis la ekziston de unusola dio – Atono, la Suno (kredo, kiu ĝis tiam estis unikaĵo de inicitoj) – tiel fondante la unuan oficialan monoteisman religion. Amenhotep eĉ ŝanĝis sian nomon por honoro la unusolan Dion – li do poste estis konata kiel Akenatono, kiu signifas “servanto de Atono”<sup>2</sup> (pli detale – en *KONTAKTO* numero 196, 2003:4 – Red.). Post la morto de Akenatono, la teba pastraro, bedaŭrinde, restarigis la malnovan politeisman religion. Lia kontribuo al la evoluo de religio tamen estis gravega.

## Enkonduko en Eŭropon

Fruaj helenaj filozofoj, kiel, ekzemple, Taleso kaj Pitagoro, estis inicitaj en la esoterajn skolojn en Egiptio, kaj poste enkondukis rozkrucon filozofion en Grekion (do, efektive, en okcidentan civilizacion).

Dum la regado de Karolo la Granda, la franca filozofo Arnaud enkondukis rozkrucismon en mezepokan Francion, de kie ĝi disvastiĝis tra Okcidenta Eŭropo. Komprenoble, en tiu epoko de superstiĉoj, mallklereco kaj maltoleremo, la Rozkruca Ordeno devis kaŝi sin sub diversaj nomoj, kaj adeptoj devis vuali la mistikajn



“Vitruvia viro” de Leonardo da VINCI

instruojn per riĉa simbolismo kaj kaŝi ilin en alhemiaj formuloj, kabalaj simbolaroj, ritaj de kavalaraj ordenoj kaj en la kantoj de trobadoroj<sup>3</sup>.

Aparte gravan rolon en la evoluo de rozkruca filozofio en la Mezepoko ludis la Templanoj kaj eĉ pli, la alhemiiistoj. Dum la tempoj de la krucmilitoj, la Templanoj havis rektan kontakton kun la orientaj misterskoloj kaj tiel fariĝis perantoj de la antikva esotera scio. Mezepokaj alhemiiistoj ricevis alhemiajn sciojn de arabaj kleruloj, kiuj, feliĉe, konservis la mistikajn instruojn, hereditajn de la helenoj, dum la haoso reganta en Eŭropo post la kolapso de Romio. Sed malkiel la kliŝaj prezentoj en popularaj literaturo kaj filmoj, ne ĉiuj alhemiiistoj praktikis *materian alhemion* (la transformado de malnoblaj metaloj, ekzemple, de plumbio, en oron per multetapaj procezoj) – iuj praktikis *spiritan alhemion*, t.e. la penado transformi la bazajn homajn ecojn en noblajn virtojn kaj manifesti la latentan diecon en homoj. Ĝuste tiu ĉi spirita alhemio fariĝis grava parto de la rozkruca tradicio.

## La Renesanco kaj Christian ROSENKREUZ

Dum la revekiĝo de la kultura kaj intelekta vivo de la Renesanco komenciĝis nova etapo en rozkruca historio. En la jaroj 1614, 1615 kaj 1616 estis eldonitaj la rozkrucaj manifestoj *Fama Fraternitatis*, *Confessio Fraternitatis* kaj *Nuptiae Chymicae* (*Hemia Geedziĝo*), respektive, sub la pseŭdonimo Christian ROSENKREUZ (kristjan rozenkrojo). Kvankam li estis vere nur alegoria persono, kiu reprezentis la mistikan idealon kaj la reak-



Grandtemplo

tivigon de la Ordeno<sup>4</sup>, la publiko plejparte interpretis la rakontojn vortvorte, kredante, ke Christian ROSENKREUZ ekzistis, kaj ke li efektive fondis la Ordenon. Tio, plus la fakto, ke en tiu epoko la Ordeno fariĝis *publike* konata kiel la Ordeno de la Rozkruco, kontribuis al la miskredo, ke la rozkruca movado aperis nur en la 16-a jarcento.

## La Ordeno en Ameriko kaj H.S. LEWIS

Ĉirkaŭ 1693 Johannes KELPIUS, grandmajstro de rozkruca loĝio en Eŭropo, organizis grupon da eŭropaj rozkrucaj por vojaĝi al Ameriko kaj tie fondi kolonion laŭ plano priskribita de Francis BACON [BEJCON] en lia verko *Nova Atlantido*. En 1694 ili alvenis en Pensilvanion kaj ekloĝis apud Filadelfio. En 1732 plia rozkruca komunumo estis fondita en okcidenta Pensilvanio. Rozkrucaj de ĉi tiuj komunumoj multe kontribuis al la progreso de artoj, sciencoj kaj filozofio.

Pro tio ke, laŭ la tradicia regulo, la Rozkruca Ordeno en Ameriko devis en 1801 malaktiviĝi, jam en 1909 venis la tempo, ke la Ordeno denove aktivigu en Norda Ameriko (kvankam dum la Ordeno estis neaktiva en Ameriko, ĝi tamen aktivis en diversaj eŭropaj landoj). En tiu jaro usona filozofo D-ro Harvey Spencer LEWIS [harvi spenser ljuis] vojaĝis al Francio, kie li, post la necesaj instruado, preparado kaj ekzamenado, estis inicita en la Rozkrucon Ordenon. Poste la gvidantoj de la Rozkruca Ordeno komisiis D-ron LEWIS revigligi la Ordenon en Norda Ameriko.

En 1915 D-ro LEWIS establis la



# ur la Amico



H.S. LEWIS, Imperatoro de AMORC inter 1915 kaj 1939

Ni staras nun en la komenco de la 21-a jarcento – estas nun *nia* decido, ĉu ĝi estos pli paca, spirita, humana kaj lumoplena, ol la antaŭa...

Por informoj en diversaj lingvoj vizitu <[www.amorc.org](http://www.amorc.org)>



lo de AMORC



“La Templo de la Rozkruco”, alegoria desegnaĵo de la 17-a j.c.

Ordenon en Usono, kun sidejo en Novjorko, kun la oficiala nomo “Antikva kaj Mistika Ordeno de la Rozkruco”<sup>5</sup>.

En 1927 oni translokiis la sidejon al San-Joseo, Kalifornio, kie ĝis nun troviĝas granda rozkruca centro, Rozkruca Parko, kun egiptologia muzeo, planetario, laboratorioj, rozkruca universitato, templo k.a.

En 1934 en Bruselo la FUDOSI (*Fédération Universelle des Ordres et des Sociétés Initiatives* – Universala Federacio de Inicaj Ordenoj kaj Societoj) – ligo (nun ne plu ekzistanta) de tradiciaj inicaj ordenoj, kies celo estis gardi la aŭtentikan esoteran tradicion kontraŭ trompaj imitantoj kaj disskismiĝo – deklaris AMORC-on la sola heredanto de la aŭtentika rozkruca tradicio.

Dum sia mondkongreso en 2001 en Gotenburgo, Svedio, AMORC prezentis al la publiko novan manifeston, *Positio Fraternalitatis Rosae Crucis*<sup>6</sup>, dokumento kiu priskribas la sintenon de la Ordeno rilate la nunan staton de la mondo kaj ĝian esperon por la estonteco.

## Organiza Strukturo

La nuna AMORC konsistas el pluraj grandloĝioj (distriktoj) tra la mondo. Unu grandloĝio servas membrojn de unu lingvogrupo (ekzemple, la Franclingva Grandloĝio prizorgas ĉiujn franclingvajn landojn kaj ĉiujn francparolantojn). Ĉiun grandloĝion estras grandmajstro. Ĉiu grandmajstro membras en la Plej Supera Konsilio, kiu elektas la Imperatoron<sup>7</sup> – la gvidanton de la tutmonda Rozkruca Ordeno. Ĉiu grandloĝio siavice havas ene de sia teritorio lokajn filiojn nomatajn loĝioj, kapituloj kaj pronaosoj (loĝio estas la plej

granda loka grupo; kapitulo – mezgranda, kaj pronaoso – plej malgranda). En ĉiuj ĉi tiuj lokaj filioj, membroj povas kunveni por aŭskulti prelegojn, kune studi kaj mediti kaj interdiskuti; en loĝioj ankaŭ aliaj ceremonioj estas plenumataj.

La unueca internacia strukturo garantias al membroj de ĉiuj grandloĝioj, ke ĉie en la mondo la instruoj, servoj kaj ceremonioj estas samaj, kaj ke estas observataj la samaj mistikaj kaj humanaj idealoj de la Rozkruco.

## Instruo, Inico, Vivo

Ĝis la 20-a jarcento ĉiuj rozkrucaj studentoj ricevis lecionojn parole en loĝioj. Tamen tiu ĉi sistemo ne estis oportuna por homoj loĝantaj malproksime de loĝio. Do, en 1917 D-ro LEWIS enkondukis sistemon de korespondaj lecionoj nomataj *monografioj*. Ĉi tiu sistemo montriĝis ne nur praktika, sed ankaŭ efika, kaj post la Dua Mondmilito ĉiuj grandloĝioj adoptis ĝin.

Nuntempe la rozkruca instruprogramo konsistas el kvar sekcioj: novica, neofita, inicita (konsistanta el naŭ gradoj) kaj iluminita (konsistanta el tri gradoj).

Kiel la originoj de la Ordeno mem, la originoj de la rozkrucaj instruoj kuŝas en antikveco. Sed tra la jarcentoj rozkruca filozofio evoluis laŭ la evoluo de homa konscio. Inter la multegaj filozofoj, sciencistoj, artistoj k.a. kleruloj, kies scioj kontribuis al la rozkruca tradicio, kelkaj estas: L. da VINĈI, F. BACON, KARTEZIO, PASKALO, SPINOZO, LEJBNICO, NEŬTONO, N. ROERICH [RERIH], B. FRANKLIN k.a.

Ankaŭ nun la rozkrucaj instruoj evoluas laŭ novaj sciencaj malkovroj kaj la ĝenerala evoluo de la homa konscio.

La temaro de la rozkrucaj instruoj estas tiel vasta, kiel la vivo mem. Kelkaj ekzemploj de gravaj temoj estas: strukturo de materio, fazoj de homa konscio, originoj de vivo, metafizika kuracado, la homa aŭro kaj psikaj centroj, evoluo de la homa animo, morto kaj postmorta vivo, karmo kaj reenkarigo, konceptoj pri Dio, teknikoj de meditado kaj diversaj aliaj temoj rilataj al mistikismo, filozofio kaj spiriteco. Krome, lecionoj enhavas ankaŭ diversajn ekzercojn kaj eksperimentojn, kies celo estas disvolvi mensajn kaj psikajn kapablojn.

La rozkrucaj instruoj, tamen, tute ne estas dogmaj – oni admonas la studenton esti ĉiam “vivanta demando-disigno” kaj obei unue al la plej grava majstro – la Interna Majstro<sup>8</sup>.

La Rozkruca Ordeno tamen ne estas simple filozofia skolo – ĝi estas ankaŭ *tradicia inica ordeno*. Jam de la originoj de rozkrucismo en antikva Egiptio inicado ĉiam ludis esencan rolon en la Ordeno. Kvankam la valoro de inico estas malfacile klarigebla per vortoj, tamen eblas diri, ke ĝi havas tri tradiciajn funkciojn: prepari studentojn por la venonta grado de studoj; malkaŝi specifan parton de la rozkruca tradicio al ili; kaj igi ilin aŭskulti la voĉon de la animo. Studento povas sole plenumi inicojn hejme, aŭ esti inicita kun aliaj studentoj en loĝia ceremonio.

Sendube, dum la 20-a jarcento teknologio progresis pli ol iam ajn antaŭe en la historio de la mondo. Ni nun posedas la teknologion, kiu ebligas al ni komunikigi kun homoj en aliaj mondpartoj ene de kelkaj sekundoj... Sed ni posedas la teknologion, kapablan ankaŭ tute neniiigi la homaron kaj ruinigi la planedon. Estas evidente, se rigardi la eventojn de la pasinta jarcento kaj de la nuna mondo, ke la evoluo de teknologio jam superis la evoluon de la kolektiva homa konscio – ja ege timiga situacio...

Ĉefa kaŭzo de tiu ĉi malekvilibro inter la evoluoj de konscio kaj teknologio estas neglektado de la spirita aspekto de la homo. La Rozkruca Ordeno helpas homojn reakiri ekvilibron inter korpo, menso kaj animo – inter fizika vivo, intelekta vivo kaj spirita vivo. Necesas unue krei pacon kaj harmonion ene de la *individua homo* por ke povu estiĝi paco en la tuta mondo.

- 1 N.PIV difinas rozkrucismon jene: “esotera doktrino kaj sekreta societo, aperinta ĉ. la 16-a j.c., emfazanta asketismon kaj sinkonon” – ĉi tiu difino estas nur duonvera: rozkrucaj instruoj estas ja esoteraj kaj emfazas sinkonon... la Rozkruca Ordeno *publike* aperis en la 16-a j.c., sed *ekzistis* antaŭ tiam; ĝi ne estas sekreta societo, sed nur *diskreta*; kaj ĝi tute ne emfazas asketismon – eĉ male, la dueco de homo postulas, ke oni estu plene engaĝita kaj en la spiritan, kaj en la materialan sferojn de la vivo.
- 2 Laŭ malsamaj fontoj, “gloro al Atono”, “pia al Atono”, “plaĉa al Atono”, “filo de Atono”.
- 3 Sed malgraŭ la malhelpoj de la tiama tiraneca, maltolerema sociordo, rozkrucaj filozofoj sekrete aŭ diskrete kontribuadis al la progreso de la artoj kaj scienco, kaj al la progreso de civilizacio ĝenerale.
- 4 La Rozkruca Ordeno tradicie funkcias en cikloj, de alterne aktivaj kaj malaktivaj periodoj. Unu aktiva aŭ malaktiva periodo daŭris 108 jarojn.
- 5 Oni alprenis la nomon AMORC por distingi la Ordenon de diversaj grupoj, kiuj uzas la nomon “Rozkruca”.
- 6 La angla versio troviĝas ĉe <<http://www.rosicrucian.org/publications/positio.pdf>>; troveblas ankaŭ alilingvaj versioj en la reto.
- 7 La nuna Imperatoro de AMORC estas franco Christian BERNARD.
- 8 La “Interna Majstro” estas la manifestiĝo de Dio en la homa koro.

## <Leĝu>

La *regado de la vivo*. AMORC. 1993. 35 paĝoj. 2,10 EUR. Bv. mendi ĉe la libroservo de UEA – <[www.uea.org/katalogo](http://www.uea.org/katalogo)>.

# Alternativa UN? Jes!

Unuiĝinta Civitana Alianco (UCA) estas fondita kiel pli demokratia versio de UN (tamen, UN ankoraŭ tute ignoras ĝian ekziston) por antaŭenigi novan, pli fortan kaj pli justan bazon por internacia kunlaboro kaj komuna sekureco. La organizo funkcias jam nun, sed ĝi kreskos kaj plivastiĝos laŭ detale ellaborita plano. Kaj la ĉefa laborlingvo de UCA estos Esperanto!

Trish KINCADE,

Usono (speciale por KONTAKTO)

En la fruaj 1990-aj jaroj kuniĝis grupo da homoj, kiuj kredis, ke la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estas nek sufiĉe ampleksa nek bone protektata de la Unuiĝintaj Nacioj. Ili kredis, ke necesas alia homrajt-protektita dokumento valida por la tuta homaro – Garantiitaj Rajtoj de Persona Libereco. Pro tio, UN-reformo fariĝis unu el ĉefaj fokusoj de la grupo, kiu eknomis sin la “Civitanoj”.

En 2002 la Civitanoj konkludis, ke la nuna Organizo de Unuiĝintaj Nacioj neniam estos sufiĉe forta aŭ eĉ ema subteni kaj defendi la Garantiitajn Rajtojn de Persona Libereco. Do, ili decidis, ke necesas pli forta agado kaj kreis alternativan internacian registaran instancon – Unuiĝintan Civitanan Aliancon. Ĝia celo estas antaŭenigi la Garantiitajn Rajtojn de Persona Libereco kaj konvenigi la Altan Konsilion de Aliancitaj Nacioj, kiuj laboru pri verkado kaj ratifo de la nova monda “konstitucio” por UCA kaj ĝiaj aliancitaj nacioj. Do, la ĉefa ideo estas establi pli demokratian, justan kaj efikan version de la Unuiĝintaj Nacioj.

Laŭ ĝiaj intencoj kaj celoj, UCA estas internacia registara organizo, kiu strebas al formala agnosko de la ĉefaj mondopotencoj. De nure jura vidpunkto UCA estas kunlabora organizo, kiu konsistas el diversaj komercaj kaj senprofitcelaj entreprenoj (ĉiuj ili estas posedataj kaj administrataj de UCA). Sed oni povus demandi, kiel ĝi povas esti *registara* organizo sen agnosko de ŝtataj registaroj? La fondon de UCA eblas kompari al la fondo de Usono: ja kiam la fondintoj de Usono subskribis la Deklaracion de Sendependeco kaj tiel deklaris la 13 koloniojn sendependaj de Britio, ili havis nek subtenon nek agnoskon de iu ajn lando... La financa bazo de nia oranizo estas donacoj de individuoj kaj entreprenoj kaj ankaŭ investprofitoj.

## Bona hegemonio?..

La UCA havas tri ĉefajn branĉojn: la Alta Konsilio de Nacioj (leĝdona), la Superega Konsilio de Arbitraciistoj (justica) kaj la Hegemonio (ekzekutiva). Kial UCA uzas la terminon “Hegemonio”? La respondo estas verdire ne tiel komplika. La difino de hegemonio estas: “Superrego de unu homgrupo (korporacio, urbo, nacio k.a.) super la aliaj” (N.PIV). Sed eblas distingi du specojn de hegemonio – *negativa* kaj *pozitiva*. Negativa hegemonio estas la *perforta* dominado de suverenaj nacioj fare de unu nacio; sed pozitiva hegemonio estas la *influo* kaj *gvidado* de unu instanco aŭ registaro, elektita de suverenaj nacioj, kiuj alianciĝis por paco kaj sekureco. Pro la filozofio de “pozitiva hegemonio”, la ekzekutivo de UCA (laŭstatuse simila al “Prezidento” aŭ “Ĝenerala Sekretario”) estas nomata la Hegemonio – ĝi konsistas el tri individuoj.

UCA tre emfazas socialajn programojn, kiel edukado, katastrofhelpo, abolo de sklaveco (en iu formo ĝi ankoraŭ ekzistas...) kaj multajn aliajn homamajn klopodojn. La *Hegemonio* nun aranĝas la kolektadon de almenaŭ kvin milionoj da usonaj dolaroj por cunamo-helpprogramoj kaj intencas sendi ĝis 500 alianc-servajn laborantojn por efektiviĝi tiujn helpprogramojn kaj kunlabori en la ĝeneralaj helpklopodoj.

## Kiel membriĝi?

Estas du specoj de membroj – UCA-Civitanoj kaj Civitanoj de la Aliancitaj Nacioj\*. Oni donas la civitanecon al homoj, kiuj laboras – ĉu plentempe, ĉu volontule – por UCA aŭ kiuj faris grandajn kontribuojn al la sociala kaj kultura bonfarto de la homaro. La ŝtatoj povas aliĝi pere de siaj naciaj registaroj tra kutimaj diplomatiaj kanaloj. Nun en la organizo estas kelkcent volontuloj kaj konstantaj laborantoj, kaj ĝi reprezentas la interesojn de kelkmil individuoj tra la mondo (inkluzive de pluraj subpremataj popoloj ignorataj de UN).



Hegemonio WOLF

Hodiaŭ UCA enhavas grandan nombron de Civitanoj en pluraj landoj (Usono, Kanado, Belizo, Britio, Finnlando, Portugalio kaj Aŭstralio) kaj rapide kreskas laŭ grandoj kaj subteno. Krome, la *Hegemonio* tre interesiĝas pri la multaj nereprezentataj nacioj kaj popoloj de la mondo, kies ekziston la Unuiĝintaj Nacioj ne agnoskas kaj kies suverenecon ĝi ne protektas.

## Kaj Esperanto?

Lastatampe UCA decidis plene kaj oficiale subteni Esperanton kiel internacian duan lingvon. Malsimile al UN, UCA decidis traduki ĉiujn siajn oficialajn dokumentojn kaj arkivojn en Esperanton kaj funkcii ĉefe en tiu lingvo. Ĉiuj planataj UCA-lernejoj instruos Esperanton kiel duan lingvon kaj, inter aliaj celoj, ni strebos havebligi instrumaterialojn pri Esperanto al lernejoj tra la tuta mondo.

\* tio iom similas al UEA-membreco, kie ekzistas individua membreco kaj aligita membreco, t.e. homoj, kiuj membras en landa asocio, aliĝinta al UEA – Red

Peris Chuck SMITH, Usono (oficiala reprezentanto de UEA ĉe UN). El la angla trad. Joel AMIS.

## <RETE>

Pli detale pri UCA legu ĉe la retpaĝo de la oficejo de Hegemonaj Aferoj de UCA <[www.hegemony-gov.org](http://www.hegemony-gov.org)>.

Chuck SMITH (reprezentanto de UEA ĉe UN), Usono

## UN: Jarmilaj Evoluigaj Celoj

Oni multfoje aŭdas pri la oficialaj rilatoj inter UEA kaj UN, sed oni malofte scias pri la detaloj de tiuj rilatoj. Efektive, UEA tenas la plej altrangan rilaton kun UN, kiu eblas por Neregistara Organizo (NRO). Niaj rilatoj permesas al ni havi po kvin reprezentantojn en Novjorko, en Ĝenevo kaj Vieno. Nun UEA havas po tri reprezentantojn en ĉiuj tiuj

urboj, do, entute naŭ. De la oka ĝis la deka de septembro 2004 mi oficiale reprezentis UEA-n ĉe UN-konferenco en Novjorko pri la Jarmilaj Evoluigaj Celoj (MDG – Millennium Development Goals), kiujn oni volas plenumi ĝis la jaro 2015. Estus tre bone, se ĉiuj povus disvastigi ĉi tiujn celojn, por ke la publiko pli multe konsciu pri ili.

Jen la oficiala traduko en Esperanton: 1. Elradikigi ekstreman malriĉecon kaj malsaton. 2. Atingi universalan elementan edukadon. 3. Antaŭenigi seksan egalecon kaj doni povon al virinoj. 4. Redukti la nombron de infanaj mortoj. 5. Pli bonigi la sanon. 6. Komunumo Kontraŭbatali HIV/aidoson, malarion kaj aliajn malsanojn. (WFUNA). 7. Certigi median daŭripovon. 8. Starigi tutmondan partiversion – ĉe <<http://www.livejournal.com/community/esperanto/88157.html>>. Unu el la plej interesaj okazintaĵoj estis la kuna laborsesio de UEA, la Bahaa Internacia kaj la Monda UN-Asocioj pri niaj rilatoj, ne hezitu kontakti min <[chuck@tejo.org](mailto:chuck@tejo.org)>.

nomiĝis “Kiel superi lingvajn barilojn por disvastigi kaj plenumi la Miljarajn Evoluigajn Celojn”. Humphrey TONKIN kaj Timothy REAGON [timoti rejgan] inspire kaj lerte klarigis la problemojn pri komunikado de ĉi tiuj celoj al indiĝenoj, kiam malmulte da aktivistoj povas paroli iliajn lingvojn.

Mi planas resti reprezentanto de UEA [kaj TEJO] ĉe UN, do se vi havas demandon pri niaj rilatoj, ne hezitu kontakti min <[chuck@tejo.org](mailto:chuck@tejo.org)>.



## Humanisma Junulara Unio

Ĝi estas neŝtata, nekomerca unuigo de gejunuloj. Malgraŭ la neformala karaktero de la organizo, ĝi havas statuton kaj estas jure registrita. La ĉefa celo de la Unio estas krei humanisman socion. Por realigi ĝin oni disvastigas en nia socio humanismajn ideojn, proponas kaj praktikas alternativan vivmanieron kun ties valoroj, do alternativan kulturon, kiu kontraŭstaras al la moderna konsumkulturo. Tutmonda krizo de moderna konsumsocio estas evidenta, laŭ opinio de HumJUnio: endanĝerigitaj estas ne nur homoj vivantaj en tiu socio, sed ĉio kontaktanta ĝin – t.e. preskaŭ ĉiu parto de nia planedo, kaj do la planedo mem. La listo de krizaj fenomenoj estas longa, ekzemple, malnaturigo de konsumajtoj; forta homa individuismo; konstanta danĝero de tutmonda milito; kreskanta medipoluo; amasa mortado de la loĝantaro en ekonomie malpli evoluintaj landoj; detruo de naciaj kulturoj kaj tutmonda dominado de usona amaskulturo; dispartigo de la mondo en la landojn riĉajn kaj malriĉajn ktp. Ŝajnas, ke la plimulto da homoj komprenas tion, tamen ofte tiu plimulto pasive vivas kun sia kompreno, neniel agante por alia mondordo.

La Humanisma Unio proponas al homoj, kiuj rigardas sin agantoj sed ne pasivaj observantoj, unuigi kaj ŝanĝi la mondon dominatan de konsumismaj valoroj en mondon dominatan de humanismaj valoroj. Kune kun transformado de la socio, unu el la ĉefaj punktoj en la kulturo kaj aktivajtoj de la Unio estas sinperfektigo de ties membroj. Sinperfektigo kaj ŝanĝo de la socio – jen estas la celoj de la HumJUnio, kiuj realiĝas en diversaj projektoj kaj aktivadoj.

Unu el la tradiciaj projektoj de la Unio estas t. n. Studo pri Psika Kulturo, kiu celas helpi pli bone ekkoni sin mem. La Unio ĉiujare invitas interesigantojn partopreni en tiu projekto (oni kunvenas ĉiusemajne). La ĉefa tasko de la Studo estas kunagado en krea sinrealigo. Dekomence, la Studo iom similas al lecionoj: pli spertaj studanoj donas informojn pri elektitaj temoj al novuloj, kaj poste tiuj enprofundiĝas en la temon laŭ propra bezono kaj intereso. La studanoj praktikas tamen ne nur diskutojn, sed ankaŭ, ekzemple, psikofizikajn ekzercojn. Membroj de la Humanisma Unio rigardas homon kiel fenomenon kun mini-

mume tri aspektoj: biologia, kultura kaj spirita, kaj en la Studo oni okupiĝas pri evoluigo de ĉiuj ili.

Ne ekzistas iuj universalaj vivmaniero kaj pensmaniero, kiun la Studo penas altrudi al siaj anoj – ĉiu esploras sin mem kaj mem elektas la vojon, kiu plej kongruas kun la propraj individuajtoj, kiu permesas al homo plej plene reali-

agado. La Koalicio unuigas humanistojn el Rusio, Aŭstralio, Germanio, Nepalo... La ekzisto de tiu ĉi organizo gravas kaj por ties membroj, kaj por la ekstera publiko. Ĝiaj agado kaj kunveno donas al la koalicianoj la eblon konscii humanismajn ideojn pli altnivele, profundigi ilin; spertaj membroj povas aktualigi, sintezi

la nunaj krizaj fenomenoj estas la principo “eluzi ĉion ekzistantan por fiprofiti” (sur tiu principo, bedaŭrinde, baziĝas la nuna civilizacio...).

Dum la tuta socia sistemo estas direktita al la gajno de troa profito, homo evidente ne havas sian lokon en ĝi. En tia sistemo homo estos formata ne kiel personeco, sed kiel konsumanto kaj varo. Tia misformado de la homa personeco havas rektajn sekvojn, ekzemple, egoisman sintenon de homoj. Kun tiu konsumisma deformado de la homo estas ligitaj kaj la kresko de droguzado, kaj ekologiaj katastrofoj, kaj politikaj kaj militaj konfliktoj... Tio fariĝos pli klara, se vi konsideros jenon: por vendi iun kvanton da drogoj aŭ armiloj, oni devas antaŭe krei la postulon por tiuj varoj; por malfermi novan atoman testejon aŭ komenci militon, oni devas havi la subtenon (almenaŭ pasivan) de granda parto de la loĝantaro, t.e. denove estiĝi la postulon. Kaj tio funkcias en ĉiuj sferoj.

Tio ne signifas, tamen, ke oni entute ĉesu produkti – simple bezonatas radikala reorganizo de la sistemo: la celo estu ne varo kaj riĉeco, sed homo kiel memvalora estaĵo. “Ideala homo” en mondkulto estas nesatigebla konsumanto kaj fervorega laboranto. Klaras, ke en tiu komerca mondo humanismaj ideoj ne estas tre popularaj, ĉar ili atentigas pri la valoro de nia planedo kaj ĉio, kio vivas sur ĝi, pri la graveco de aliaj partoj de la homa personeco, kiuj ĉiuj nur kune formas la Homon. Tamen oni ofte mencias jen tiun jen alian sloganon kun humanisma aspekto: politikistoj kaj respondeculoj hipokrite uzas ilin kiel parton de sia masko, kiun ili prezentas al sia elektantaro, kaj restas samtempe interne indiferentaj.

La koalicianoj strebas al la humanisma transformado, en kiu la kulto de homo kiel ĉiuflanke evoluanta personeco anstataŭas la monkluton. Unu el la iloj por atingi tiun transformadon estas diskonigo de humanismaj ideoj, konsciigo pri la difekteco de la nuna sistemo, proponado kaj subtenado de alternativaj vivstiloj. Ni strebas ne al iu abstrakta alia mondo, utopio, sed havas konkretajn bildon pri tio, kion ni volas fari, kaj laŭeble agadas tiudirekten. La anoj de la Koalicio estas konvinkitaj, ke la transformiĝo estas neevitebla, ke ĝi estas etapo en la evoluo de la mondo, kaj ke finfine humanismo estos ne margena filozofio, sed normo – tiel opinias la Internacia Koalicio por Humanismo.

# Humanismo: por pli bona mondo!

Ŝajnas, ke ĉiuj konas la vorton “humanismo”. Iuj eĉ povas diri, ke ĝi aperis dum la Renesanco kaj nomi Leonardon da VINĉI-n aŭ Mikelanĝelon. Sed ne multaj scias tamen, ke humanismo estas ne nur etapo en la historio de la homaro. Ĝi formiĝis kiel movado kun propra ideologio kaj dum kelkaj jarcentoj evoluis en skolon kun diversaj direktoj kaj fluoj. En tiu ĉi artikolo mi rakontos pri la Humanisma Junulara Unio – organizaĵo, kiu aktivas en Rusio, ĉefe en Sankt-Peterburgo – kaj pri Internacia Koalicio por Humanismo. Ambaŭ tiuj organizaĵoj unuigas homojn, kiuj ne nur simpatias kaj subtenas humanismajn ideojn (kion faras multaj), sed kiuj identigas sin kiel humanistoj kaj prenas humanismajn ideojn kiel principojn por sia vivo.



La aŭtorino (maldekstre) kun humanistaj geamikoj



gi siajn kapablojn kaj atingi internan kaj eksteran harmonion.

## Internacia Koalicio por Humanismo

La Internacia Koalicio por Humanismo estas organizo, en kiu humanistoj – margena homgrupo de la nuna socio, – disaj tra la tuta mondo, povas trovi samideanojn. Ĝi estis planita kiel malferma neformala organizo, kiu celas unuigi organizojn kaj unuopulojn kun humanisma mondrigardo kaj

ideojn, akumuli ilin en krea interŝanĝo kun samideanoj.

Se paroli pri la ekstera efiko, la Koalicio celas altiri atenton al la plej akraj problemoj en la vivo de la homaro, kiuj estas solveblaj nur per komunaj penoj de ĉiuj. Kromaj celoj de la Koalicio estas kontribui al ĉiuflanka integriĝo de la homaro sen damaĝoj al iu nacio aŭ ŝtato kaj opozicii la danĝerajn tendencojn ligitajn al establiĝo de transnacia oligarĥio kaj tutmondiĝo. La koalicianoj opinias, ke la kialo de



cia subteno, Venko JU **deklaris** sin ĉef-oligarĥo de Kranio kaj eĉ **ĵuris** kun la mano sur la plej freŝa eldono de la "Internacia Deklaro pri Komaj Rajtoj" de OIL. Tiam jam ĉirkaŭ duono de la lando estis mandarina. Sur la ĉefa placo de la ĉefurbo kreskis "mandarina **kaban-urbeto**" (oni konstruis la dometojn el la ligno-skatoletoj, en kiuj mandarinoj estis senditaj). Okcidenta Kranio akceptis JU-n kiel ĉef-oligarĥon kaj volis represi ĉiujn lernolibrojn sen komoj antaŭ "ke". Tamen, ĉar Jelopa Unuiĝo promesis, sed, kiel ĉiam, ne donis mon-helpon, oni decidis permane blankigi komojn per blanka farbo.

"Nia cerbo ne manĝigu ilian buŝon", – **alegorie** diris pli riĉaj orient-kranianoj, kiuj tuj ekvolis apartiĝi de okcidenta Kranio, ĉar ili ja ŝatis komojn antaŭ "ke" kaj tute malŝatis mandarininojn. "Ni ne rompu nian Kranion!" – tuj respondis la okcident-

faris mandarinajn poŝmarkojn, monon (kompreneble, kun la bildo de JU) kaj eĉ mandarinan bieron, kiu havis apartan sukceson. Post la ĵuro (JU jam lertiĝis pro plurfoja ekzerco) oni liberigis **kolombojn** (ankaŭ mandarin-kolorajn!). Tiam okazis granda malordo – la kaban-urbeto komencis **ĉasi** la birdojn, ĉar post la venko de JU oni ne plu pagis al ili, do, ili devis mem trovi manĝaĵojn.

La nova ĉef-oligarĥo en-ofic-iĝis kaj komencis plenumi sian programon, kiu nomiĝis "Demokratio kaj interpunkcia libereco". Kiel ĉef-**plutokraton** (ĉefo de la ministraro) li proponis sian bonan amikino – Ŝtelan GASSAN (ŝi estis lerta kaj kreema komercistino), ĉar ŝi multe helpis dum la revolucio; la restantajn registarajn oficojn ili disdonis kune – al la amikoj, familianoj, komerc-partneroj, kun-revoluci-intoj ktp.

La unua demokratia ŝanĝo, kompreneble, rilatis la interpunkcion:

Melona ktp.), por paroladi pri la Granda Krania Revolucio kaj plena interpunkcia demokratiigo: "Ĝis nun Kranio estis saĝa kaj forta, sed dormanta **elefanto**", – diris li alegorie. Sed... la aŭskultantoj tute miskomprenis lin, kaj tuj imagis la vekigon de la "elefanto" kaj ĝiajn eblajn sekvojn (dis-romp-ado de multekostaj teleroj en vendejoj ktp.). Dum la resto de la prelego li devis klarigadi, ke temas pri tre bona kaj afabla elefanto, kiu tute ne intencas dis-rompi la telerojn. (*Ĉi tie mi devas halti, ĉar la ankoraŭ ne plene demokratiaj KONTAKTO-redaktistoj, anstataŭ plilongigi "miajn" paĝojn, simple malpermesis al mi verki pli, dirante, ke ne plu estas spaco... – Jojo.*)

**PS.** Post la efektiviĝo de la politika reformo JU fariĝis senpova "langia reĝino" kaj do havis multe da libertempo por verki sian help-libron "Revoluciado por stultuloj: dek facilaj paŝoj". Ŝtella GASSA fariĝis la plenpova "Gvidantino" de Kranio kaj restis en tiu grava ofico loongan tempon. Malvenkinto JA kaj iama ĉef-oligarĥo AMĈUK plentempe okupiĝis pri pied-pilko. Kaj la kaban-urbeto fariĝis "profesiaj revolucistoj" – do, se en iu urbo aŭ eĉ lando oni bezonas helpon (por ŝanĝi prezidanton ktp.), oni povas dungi ilin.

*Eventualaj similecoj de la nomoj kaj lokoj al veraj okazis pro nura hazardo – Jojo*

*(rigardu ankaŭ la politikan vortareton)*

**alegorio** – parolo kun kaŝita signifo  
**ĉasi** – provi mortigi por manĝi  
**deklari** – anonci, eldiri  
**elefanto** – plej granda nun-tempa sur-tera besto  
**falsita** – malvera  
**gramatiko** – lingvaj reguloj  
**hazarde** – neatendite  
**inko** – farbo por presi aŭ skribi  
**interpunkcio** – . ; - ( ) : kaj tiel plu  
**ĵuro** – deviga promeso  
**kabano** – dometo  
**kariero** – laboro (ĉiam pli kaj pli alta ofico)  
**kolektiva** – komuna  
**kolombo** – mez-granda birdo  
**komo** – ,  
**mandarino** – flava frukto  
**modesta** – kiu neniam bone parolas pri si  
**opio** – dormiga, trankviliga, stultiga aĵo  
**partnero** – kunlaboranto  
**pasporto** – vojaĝ-rajtigilo  
**salajro** – mono pro laboro  
**sopiri** – malĝoji pro manko de io  
**vitamino** – aĵo en manĝaĵo, kiu necesas por sano  
**vokalo** – a, o, u, i, e

#### Politik-ekonomia vortareto

**banko** – oficejo, kiu laŭleĝe rajtas ŝteli monon  
**caro** – ĉiam plene kaj tute prava rego  
**demokratia** – komune mal-respondeca  
**imperio** – pli belsona vorto por "granda reĝlando"  
**kapitalismo** – kiam ĉiuj laboras, kaj nur unu ricevas monon  
**konfederacio** – plej demokratia ŝtata sistemo (vd.: demokratio), kiam komuna mal-respondeco estas plej efike plenumata pro pluraj parlamentoj (vd: parlamento), kiuj efike komune malhelpas laboron de la centra registaro  
**ministro** – tiu, kiun la ŝtatestro kulpigas, kiam io malbona okazas  
**oligarĥio** – familia aŭ kluba kapitalismo (vd: kapitalismo)  
**parlamento** – aro da homoj, elektitaj por juste dividi la komunan mal-

respondecon (vd: demokratio)  
**plutokrato** – politike grava riĉegulo – t.e. ĉiuj *demokratiaj* (vd.: demokratio) riĉeguloj  
**politiko** – bona diskuttemo, kiam oni jam sufiĉe preparolis veteron kaj sporton (vestaĵojn), sed ankoraŭ tro junas por paroli pri siaj malsanoj  
**ŝovinismo** – kiam oni diras, ekzemple, ke "se en krano mankas akvo, ĝin fortrinkis \_\_\_" (enmetu nomon de la koncerna homgrupo)  
**radikala** – plej freneza, sed ne ĉiam plej bona  
**respubliko** – laŭ Ŝub la Dua: granda vorto por "lando"  
**revolucio** – nacia amuziĝo (poste – nacia malamuziĝo)  
**teritorio** – laŭ Ŝub la Dua: longa malfacila vorto por "iu landeĉaĵo"  
**uzurpi** – havigi al si per "netradiciaj" rimedoj (kompilata de Jojo)

kranianoj, ĉar ili komprenis, ke nur mandarinoj kaj bonaj intencoj ne sufiĉas por viv-teni la landon.

Ankaŭ la societistoj ne tro ŝatis komojn, sed eĉ pli malŝatis ili la ĉef-oligarĥojn. Ili proponis ŝanĝi Kranion de oligarĥ-parlamentaria respubliko al parlament-oligarĥa respubliko – simile kiel en Langio kaj kelkaj aliaj nord-jelopaj landoj. "La ĉef-oligarĥo de Kranio zorgu nur pri vizitoj al alilandaj ĉefuloj kaj pri siaj belaj ĉapeloj, kaj ĉion alian faros ni.....a popolo (la societistoj neniam pensis pri si mem). La parlamentanoj tre amuziĝis imagante la kranian ĉef-oligarĥon kiel "langian reĝinon", do, ili unuanime akceptis la proponon.

#### Por plena demokratiigo!

En la deka re-voĉdonado Venko JU finfine venkis! La tuta urbo "mandarinigis" por la oficiala en-ofic-igo de JU: oni farbis la domojn kaj vojojn mandarin-koloraj. Oni

komoj antaŭ "ke" fariĝis kontraŭlegaj. La gazetoj, kiuj ne plenumis la novan interpunkcian demokration, estis (demokratie) malfonditaj. Estis ellaborita amaskomunikila demokratiiga plano: laŭ ĝi, ĉiu raporto devis enhavi certan kvanton da vortoj "demokratio" (en diversaj formoj – demokratia, demokratiigi ktp.), depende de la grandeco de la raporto. Alia demokratiigo koncernis la manĝaĵojn – ene de du tagoj la prezoj triobliĝis por pliproksimiĝi al la jelopa nivelo (la kranianoj, tamen, ne rimarkis la gustan diferencon inter maldemokratiaj kaj demokratiaj manĝaĵoj).

En la dua tago de sia ĉefoligarĥeco JU vizitis la ursian caron NITUPON kaj donacis al li unumetran moneron kun sia bildo. Poste li iris al la ŝviejlanda urbeto Dāvós, kie ĉiujare kolektiĝas diversaj prezidantoj kaj milionuloj (Vilĉjo PORDEGO, Ĝiro SZORĈOSZ, Don TROMPO kun la vica nov-edzino

#### Agado Espero = esperantistoj por pli bona mondo!

*Kontraŭ grandaj katastrofoj – granda agado. Kontraŭ katastrofoj – agado Espero!*

Ne decas kompari la miliardojn kolektitajn por Sud-Orienta Azio kun la Fondaĵo Espero de UEA. Tamen almenaŭ unu vorto kongruas kun ambaŭ: Solidareco. Se vi volas subteni esperantistojn trafitajn de persona katastrofo, aŭ bezonegantaj helpon pro iu alia kialo, tiam sciu, ke ekzistas Fondaĵo Espero de UEA. Ĝi financas tri agadojn sub la nomo "Agado Espero":

– "solidareco" kun unuopuloj trafitaj de militoj aŭ naturaj katastrofoj;

– "lernejoj por evoluo", kiuj instruas Esperanton kaj la idealojn de paco;

– "lingvo de paco", kiu enkondukos Esperanton kaj ĝiajn idealojn en konflikt-plenajn regionojn.

Subtenajn donacojn sendu al UEA per la kutimaj pag-manieroj indikitaj en la Jarlibro kaj indiku "Fondaĵo Espero".

#### Kontoj de esperantistaj instancoj, al kiuj eblas transpagi por la viktimoj de la cunamo en Sud-Orienta Azio:

1) Poŝtgira konto de budhana Ligo Esperantista en Japanio, numero 00810-4-113665. Ĉar en kelkaj landoj ne estas eble fari tian pagon al Japanio, oni povas sendi kontantan ĉekon al s-ro Yamamoto Osamu, Sibagakityo 10-7, Obaneen, Komono-tyo, JP-510-1242 Japanio, aŭ en Usono transpagi pere de Stephen SCHWICHOW, 210 Upper Terrace Apt 3, San Francisco CA 94117-4536, tel.: 415-665-7646; ret-adreso: <schwichs@sbcglobal.net>.

2) Poŝta konto de la itala sekcio de IKUE – Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista: poŝta konto je la nomo de Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I., numero 41727675. Se vi pagas per banko jen estas la banka identiga numero de tiu samtempe banka kaj poŝta konto: IT 66 R 07601 01600 0000 47127675 (vi devas citi tiun numeron se vi pagas per banko).

3) Poŝta konto je la nomo de "Changamano Onlus" (asocio fondita de esperantistoj, kiu normale helpas homojn en Afriko, sed ĉi-kaze transdonos la helpon al Azio), kies numero estas 39280409 kaj kies banka identiga numero estas IT 29 J07601 14700 000039280409.

4) Fine, vi povus esplori ĉe <<http://www.recim.org/au/>>. Internacia Urĝa Agado estas organizaĵo fondita de kelkaj mondĉivitanoj en 1977. IUA/AUI sendis teamon de sep volontuloj en Srilankon. La alvoko por donacoj estas ankaŭ gastigata de la TTT-ejo de la Mondĉivitanoj.



Struto

Joel AMIS, Usono

Kiam la ĉef-redaktistino invitis min viziti **strut-bienon**, meze de malvarmega ukraina vintro, mi pensis, ke ŝi **ŝercas**. Mi ja ne povis imagi strutojn – tiujn afrikajn birdojn – sur la **neĝo**. Tio tre sciivol-em-igis min!

Ni veturis ĉirkaŭ horon ekster Kievon al la tre kampara loko, kie troviĝas la strut-bieno. Tiea laboranto renkontis nin kaj venigis nin al la strutejo. Kaj jen, je mia mirego, staras antaŭ miaj **okuloj** pluraj grandegaj birdoj, ĉirkaŭ du-metra (plej granda struto altas 2,44 metrojn!), sur la neĝo kaj **glacio**! Ni ĉiuj (kelkaj kunlaborantoj de Jenja) manĝigis birdojn per **herboj** – feliĉe, neniu el ni perdis  **fingrojn**  dume! (la  **beko**  de struto estas ja forta kaj rapida!). De la bien-lab-

oranto ni lernis multajn aferojn pri la vivo de strutoj: ekzemple, ke ili neniam enmetas la kapon en la teron – tio estas simpla elpens-aĵo. Alia interesa fakto – se oni forprenas **ovon** de strutino, kaj post longa tempo denove montras ĝin al ŝi – ŝi re-konas ĝin! Unu struta ovo en-tenas kvazaŭ 35-40 **kokinajn** ovojn, kaj per unu ovo eblas tute bone manĝigi 8-10 homojn. Strutoj vivas tre longe – ĝis 70 jaroj. Ili estas tre rapidaj birdoj – ilia rapideco povas esti ĝis 70 km hore, kaj iuj **kuraĝuloj** eĉ provas **rajdi** sur ili! Tamen, oni prefere ne tro altprosxim-igu al strutoj – ili ja povas ankaŭ fortege  **pied-bati** .

Ni pluiris por viziti aliajn bestojn en la bieno. Estis, kompreneble, **kokoj**, **porkoj**, **kaproj** k.s., sed, denove je mia mirego, estis tie eĉ **kamelo**! Mi neniam pensis, ke iam en mia vivo mi vidus tiun **dezertan** bestegon sur neĝo en la ukraina kamparo!

Poste oni invitis nin en la manĝejon de la bieno por grandegaj manĝegado kaj trinkado. Inter la pli ordinarnaj manĝaĵoj venis specialaĵoj – manĝaĵoj kun strutaĵo! Ĝi estis ja bongusta, sed, laŭ mi, ne inda je la alta kosto (unu kilogramo da ĝi kostas ĉ. 16 usonajn dolarojn). Tamen, ĝi estas tre sana, kaj, malsimile al aliaj birdaĵoj, struta viando estas ne

# Mi revas pri Kristnasko struta... aŭ: kiel mi fariĝis “vera ukraina viro”

blanka, sed ruĝa.

Dum la manĝo alvenis la estro de la bieno – granda, ridema, diketa mez-aĝa viro. Li klarigis al ni pri la funkciado de la bieno. La ideo kresk-igi strutojn naskiĝ-is en la kapo de la bienestro, Nikolao, tute neatend-ite: li legis artikolon pri strutoj en gazeto. De tie li ankaŭ ek-sciis, ke ili ne tre timas malvarmon (tamen,



Jes, en la ukraina kamparo!

kiam estas tre malvarme, ili loĝas en speciala domo). Tiel li fariĝis plen-tempa “strutisto” (antaŭe li estis dom-konstruisto). Kaj li tre feliĉas pri tio! Nun multaj homoj, ankaŭ raportistoj, ĉiutage vizitas lian bienon. Somere venas multaj infanoj kun la gepatroj – ja kosto de la vizito estas tute malgranda.

Kiam li rimarkis, ke mi aŭskultas ĉion ĉi per tradukado de Jenja, ŝi klarigis, ke mi estas usonano. Li ŝajne estis tre feliĉa pri tiu fakto, kaj **kriis**: “**Vodkon** al usonano!” Ver-ŝajne, usonanoj ne ofte vizitas la



La strutoj, ŝajne, ne volis “paroli” kun raportistoj

bienon. Kaj krome, manĝigi kaj trinkiĝi ekster-landanojn estas ukraina nacia ludo.

Post la manĝo Nikolao invitis la grupon al **saŭno**. Unue iris la virinoj. Poste ni (la viroj) eksciis, ke temas pri **vera saŭno**, kun **salto** en glaci-akvon, kaj do ek-nemis partopreni. Sed ja **ĉiuj** virinoj saŭnumis kaj eĉ saltis en glaci-akvon! Pro tio mi sentis, ke la **reputacio** de ĉiuj usonaj viroj (eĉ de ĉiuj eksterlandaj viroj) dependas de mi... Do, mi konsentis. Post la **infero de fajro** kaj glacio (iuj nomas tion “saŭno”) mi finfine revenis (eĉ viva!) al la grupo. Pro tiu kuraĝa ago la bien-estro **deklar**is min “vera ukraina viro”.

**bati** – ek-tuŝegi per rapida forta movo  
**beko** – buŝo de birdoj  
**bieno** – kampara ter-pecego  
**deklari** – publike kaj gravece nomi  
**dezerto** – senakva kaj senkreskaj loko  
**fajro** – ege varmega ruĝ-flava aĵo  
**fingro** – ĉiu mano havas kvin fingrojn

**glacio** – malvarmega akvo, sur kiu eblas stari  
**herbo** – kreskajo  
**fajra loko** por malbonuloj  
**kamelo** – granda **dezerta** besto kun du montetoj  
**kapro** – mezgranda besto kun du el-starajoj sur la kapo  
**koko** – ne flug-pova hejmbirdo  
**krii** – el-diregi  
**kuraĝa** – sentima  
**neĝo** – blanka aĵo, kiu falas de la ĉielo kaj restas sur la tero  
**okulo** – per ili ni vidas  
**ovo** – uĵeto, el kiu naskiĝas birdidoj  
**porko** – dika besto, kiu manĝas ĉion  
**rajdi** – sidi sur iu besto por ien veturi  
**reputacio** – kiel homoj ĝenerale pensas pri iu  
**revi** – pripensi tion, kion oni deziras  
**salti** – vole faligi sin de sur alta loko  
**saŭno** – varmega finn-devena ĉambreto  
**struto** – birdego (rigardu la fotojn)  
**ŝerci** – diri ion por ridigi  
**vodko** – fortega trinkajo (Fotoj: E.TIMĈENKO, NTO).

La redakcio dankas NTO-n (Nacia Turista Organizo) kaj la estron de la bieno pro la afabla invito.

## La reveninta kuniklo

Luc GOUVERNEUR, Francio

Iam vivis en vilaĝo maljunaj geedzoj, Johano kaj Berta. Dum Johano ŝatis zorgi pri sia ĝardeno kaj siaj **kunikloj**, Berta ŝatis kuiri legomojn, kukojn kaj... kuniklojn. La edzo kompreneble plezure manĝis la kuniklaĵon, sed tamen Berta mem devis mortigi la kuniklojn. Vi ja komprenis – tion Johano ne povis fari.

Okazis ke Berta malsaniĝis. Li do petis helpon de siaj **najbaroj** por, unu post la alia, mortigi la lastajn longorelajn bestojn. Kiam Berta, bedaŭrinde, mortis, restis nur unu kuniklo, bela, griza, amin-da. Johano tuj nomis ĝin Johaneto,

kaj ekstraktis ĝin kiel dom-beston. Ĉiutage li portis al ĝi elektitajn freŝajn herbaĵojn – tiom, ke la sekvantan printempon Johaneto jam fariĝis iom diketa sed eĉ pli bela.

Tion rimarkis ankaŭ la hundo de la ĝardenisto, kiu du- aŭ trifoje semajne venis por helpi la maljunan Johanon pri la ĝardenlaboro. Tiu bonkora besto tamen havis du malbonajn emojn: meti sian nazon iom tro proksime al la kuniklejoj kaj fosi truojn ie ajn en la ĝardenoj. Tial ĝia mastro atente kontrolis ĝin.

Post kelkaj jaroj, iun matenon, Johano malfeliĉe trovis sian karan Johaneton mortinta en ties ejo. Verŝajne, pro maljuneco aŭ pro tro

bonaj manĝaĵoj. Li fosis truon en la ĝardeno kaj enterigis ĝin. Ĉar tiam la tero estis tute preta, li enmetis ankaŭ **semojn de rafanetoj**, kiujn la kuniklo ege ŝatis.

Posttagmeze promenis tra la ĝardeno de Johano iu hundo de najbara domo. Ĉu la tero ankoraŭ odoris kunikle? Certe pro tio ĝi refosis la truon, elterigis la kompatindan beston, kaj portis ĝin en sian hejmon. Kiam la mastro rekonus la faman kuniklon de Johano, senvivante inter la dentoj de la hundo, li tuj kredis je ties kulpo. Li do purigis kaj kaŝe remetis la mortintan beston en ĝian ejon.

Tuj poste, la ĝardenisto revenis kun sia hundo de la apuda fruktarbejo. Vidinte la truon, li kredis, ke tion faris lia hundo. Li do rapide remetis la teron kaj... disjetis **brasik-semojn**.

Johano ne kredis siajn okulojn, kiam la sekvantan matenon li ekvidis, ke lia amata kuniklo jam “revenis” en sian kuniklejon. Kompreneble, neniu kuraĝis diri al li la veron. Sed post kelkaj semajnoj Johano eĉ pli miris malkovrante, ke la rafanetoj fine fariĝis grandaj brasikoj, kiujn Johaneto tiom ege ŝatis!


**brasiko** – legomo, kun grandaj verdetaĵaj manĝeblaj folioj  
**kuniklo** – long-orela besto kun moviĝema nazo  
**najbaro** – iu, kiu loĝas en apuda domo  
**rafaneto** – malgranda rozkolora aŭ ruĝa legomo kun forta gusto  
**semo** – greno, el kiu kreskas nova planto



# Pensiga legaĵo en “ne tre facila lingvo”

Paŭlo MOJAJEV, Ukrainio

**Celakantoj.** Poemaro de Jorge CAMACHO. Bero: Rotterdam. 118 paĝoj. 2004; **Saturno.** Dulingvaj poemoj de la sama aŭtoro kaj eldonejo. 140 paĝoj. Bv. mendi ĉe UEA <[www.uea.org/katalogo](http://www.uea.org/katalogo)>.



La du verskolektoj evidente prezentas iun tutajn, ĉar ja apartenas al la sama aŭtoro, aperis samtempe ĉe la sama eldonejo kaj eĉ havas tute saman dezajnon. Samtempe la libretoj ŝajnas al mi multe diferenci enhave. Ĉu do la kolektoj vere estas du partoj de la tutaĵo aŭ rajtas vivi sian apartan vivon – jenas la enigmo de Jorge CAMACHO, hispano, ŝatanta Finnlandon (kion li nekaŝeble konfesas en kelkaj siaj versaĵoj) kaj parolanta kelkajn lingvojn.

Laŭ mia opinio pli interesas la unua volumo. Ĉi tie renkonteblas plej diversaj formoj – de tre modernismaj tra tute klasikaj ĝis la plej rafinitaj (kiel rondeloj, hajkoj k.s.); ĉi tie

eblas trovi plej diversajn temojn – de meditado pri la homa esenco kaj naturo tra “manifesto” de pagano, malakceptanta dion (la versaĵo “miraklo”), ĝis foje akra politikumado. Multas ankaŭ versaĵoj kun Esperanta fono – vers-omaĝoj al reprezentantoj de Ibera Skolo kaj kelkaj aliaj famaj esperantistoj; acida kritiko kaj amara satiro pri kelkaj movadaj okazaĵoj k.s.

Multas kreaĵoj malgrandaj dimensie, sed profundaj enhave kaj fajnaj forme. La aŭtoro tre trafte utiligas aliteraciojn, lerte kunligas la formon kaj la enhavon. Se provi priskribi la dominantan stilon, eblas diri, ke ĝi estas filozofi-baza analizo de la okazaĵoj, svarmantaj ĉirkaŭ ni ĉiuj.

La kolekto “Saturno” persone al mi ekŝajnis malpli interesa. En ĝi la densaj, iom monotonaj kaj tedaj meditadoj (plejparte sen rimo kaj ritmo) estas akompanataj de iliaj tradukoj hispanen (la traduko estas ĉiam proza, eĉ kiam temas pri ritmo-havaj versaĵoj). Tamen, eĉ spite al ioma abstrakteco de la versaĵoj la dua volumo estas same pensiga, kiel la unua; la bildoj, prezentataj en ĝi estas same frappe freŝaj kaj plensukaj. Krome, la dua volumo tute certe estos utila al hispanlingvuloj, studentaj Esperanton aŭ al esperantistoj, kiuj okupiĝas pri la hispana – pri la fideleco kaj lerteco de la tradukoj oni apenaŭ povas dubi.

Fine de ĉiu volumo troviĝas eseeto pri la aŭtoro mem kaj pri lia kreado; krome, vastas sufiĉe detala kaj kelkloke interesa komentario. La libretoj mem estas bele ornamitaj kaj bone eldonitaj.

Koncerne la lingvaĵon, ĝi estas tre riĉa kaj potenca; por multaj legantoj (aŭ, kiel dirus la aŭtoro, “leguntoj”) la kolektoj estos bona kaj eble eĉ malfacila ekzerco pri “ja ne tre facila lingvo Esperanto”. Kelkfoje la aŭtoro uzas eĉ iom “riskan” lingvaĵon, sed entute la stilo de la versaĵoj estas tre bona kaj vere ĝuinda.

Se do vi ne timas iom komplikan kaj filozofian poezion, la versaĵoj de CAMACHO farigis por vi pensiga kaj pasiiga legaĵo ne nur por unu tago.



# Kio do plaĉas al vi?

Paŭlo MOJAJEV, Ukrainio

**Plaĉas al mi.** Kompakt-disko de *Kaj tiel plu*. Vinilkosmo (Donneville, Francio), 2004. 45 minutoj, 16 titoloj, tekstolibreto. Bv. mendi ĉe UEA <[www.uea.org/katalogo](http://www.uea.org/katalogo)>.



Ne estas ja sekreto, ke Esperanto helpas konatiĝi kun diversaj kulturoj kaj popoloj. Kaj por tio ne nepre necesas multe vojaĝi, partopreni forajn renkontiĝojn ktp. La konatiĝo eblas per libroj, per korespondado aŭ pere de diskoj kun la naciaj kantoj. Estas ja konate, ke popolaj kantoj estas esenco de la popola kulturo kaj mond-rigardo, ili prezentas plej fidelan bildon pri la interno de la popolo, pri ĝiaj timoj, sentoj kaj ĝojoj.

En Esperantio jam ekzistas tiaspaciaj albumoj – mi persone kun granda plezuro jam konatiĝis kun popolaj kantoj de Israelo kaj Ukrainio. Sed, verŝajne, la plej profesia kaj brila prezento de la popolaj kantoj estas farata de la grupo *Kaj tiel plu*, kiu en la nova albumo (same kiel en la antaŭa – “Sojle de la klara temp”) multvoĉe prezentas al ni la tradician kantan kulturon de la sudo de Francio (Okcitanio) kaj nordo de Hispanio (Katalunio).

Interplektiĝas kantoj gajaj kaj malĝojaj, dancigaj kaj kortuŝaj, ŝercaj kaj religiaj. Enestas ankaŭ kelkaj senvortaj komponaĵoj – do la enhavo estas plej bunta. La kantado (ofte multvoĉa) estas akompanata per popolaj muzikiloj. La muziko ĉarmas, ensorĉas, kaj la tekstoj montras al la atenta aŭskultanto, kiom proksimaj esence estas ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj popoloj. Ja laŭ la kantoj evidentas, ke malproksimaj okcitanoj, katalunoj, sefardoj (hispanaj judoj) kaj hispanoj havas la samajn problemojn kaj ĝojojn, kiel mia popolo, kiel mi mem! Jen efika armilo kontraŭ ksenofobio!

Kelkajn grumblajn vortojn meritas la tekstoj, kiel ofte estas mislokita la akcento kaj foje troveblas ne tre glataj sintaksaj formoj. Mi ne scias, ĉu tio estas kulpo de ne tre spertaj tradukistoj, aŭ eble eĉ intenca “adapto” de la tradukoj, por ke ili aspektu pli “popolaj”. Ajnokaze, al fojaj malglataĵoj eblas rapide al kutimiĝi kaj ili neniel malbonigas la impreson pri la albumo.

Konatiĝu do ankaŭ vi kun belaj, melodiaj kaj sinceraj kantoj de la malgrandaj, sed bravaj etnoj de Francio kaj Hispanio. La konatiĝo multe riĉigos ankaŭ vian propran internan kulturon! Vi ekscios, interalie, tre resuman respondon al la demando – kio do plaĉas al la homo?

Kaj fine: en la lasta paĝo de la tekstolibreto (kiu, i.a., enhavas ankaŭ la originalajn tekstojn de la kantoj) troviĝas la alvoko al la esperantistaro kontraŭbatali la internacian faŝismon. Necesas ja agnoski, ke la grupo *Kaj tiel plu* faras vere grandan laboron ĉi-direkte.

## ANONCE

### Kiŝoto-2005

Okaze de la 400-jariĝo de la unua eldono de la verko de Miguel de CERVANTES “Don Kiŝoto”, estos organizita en Hispanio multaj ĉi-temaj kulturaj aktivajoj, kaj la kontribuoj de Hispana Esperanto-Federacio estos la projekto “Kiŝoto-2005”. Unu el la punktoj de tiu projekto celas la esperantistajn infanojn de la tuta mondo. Temas pri desegnokonkurso. Kaj la temo, kompreneble, estas Donkiŝoto. Ĉu vi konas la faman kavaliron? Ĉu vi opinias lin heroo, fola revulo, simpatia frenezulo?.. Ĉu vi estas infano kaj ŝatas desegni? Jen do via ŝanco. Temo: Tia mi vidas Donkiŝoton. Aĝo: Ĝis 16 jaroj. Tekniko: libera. Formato: DIN-A4. Limdato: ĝis la 31-a de marto 2005. Noto: la desegnon akompanu kelk-

linia komento pri via opinio pri Donkiŝoto. Adreso: Hispana Esperanto-Federacio. Rodríguez San Pedro 13, 3o – 7. ES-28015 Madrid. Tel: 34.1.446.80.79. <admin@esperanto-es.net>. Ĉiu partopreninta infano ricevos dankleteron de HEF kaj malgrandan surprizan donaceton.

\*\*\*

Estas pretigita por eldono la libro “Heraldiko floranta”. Tekstoj en la libro estos en kvar lingvoj: Esperanto, la angla, rusa kaj ukraina. La libro enhavas 96 paĝojn, 25 tabelojn kun koloraj desegnaĵoj; formato A4. Eblas mendi ĉe la kompilanto – Nikolaj STARODUBCEV, UA-83000, Ukrainio, Doneck, Pochtamt, abon. ja. 191; <esperanto@postoffice.donbass.com>.

\*\*\*

22-jaraĝa komencantino kaj studentino volas korespondi kun geamikoj tutmonde pri diversaj temoj. Intereso: rokmuziko kaj instrumenta muziko, lingvoj, libroj, komputiloj kaj naturo. Margarita Bistrova. Mikrorajon 3, d. 37, kv. 59. Tihvin, Leningrada regiono, RU-187556 Rusio.

\*\*\*

### Iranaj gejunuloj deziras korespondi tutmonde

S-ro Mostafa Afsharpoor, 19-jaraĝa. Tabage 2 Gharbi, No:36, Faz:6, Shahrak Daneshgah, Jade Makhuse Karaj, Tehrano, Irano. <mostafaafsharpoorlinkinpark@yahoo.com>  
S-ro Sahand Zereshkian, 19-jaraĝa. Tabage 3 Shargi, B:6, Faz:5,

Shahrak Daneshgah, Jade Makhuse Karaj, Tehrano, Irano. <sahand264@yahoo.com>.

S-ro Babak Feiz, 24-jaraĝa. No:505, Vurodi:13, Bluk: A5, Faz:1, Shahrak Ekbatan, IR-1394614117, Tehrano, Irano. <babak@feiz.com>

S-ro Mohammad Reza Fuladkha, 28-jaraĝa. P.O.Kesto: 19395-3338, Tehrano, Irano. <mrf1356@yahoo.com>.

Fino Sayeh Soleymani, 23-jaraĝa. No:11, Kh: 20, Peyvand 17, Paknejzad, Saadat Abad, IR-19819 Tehrano, Irano. <shadejewel\_82@yahoo.com>.

S-ro Keyvan Zabihi, 29-jaraĝa. P.O.Kesto:17765-184, Tehrano, Irano. <iranmehr@sabzandishan.org>.



## FARIĜU KONSICIA SUBTENANTO DE TEJO!

### fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- revuon *KONTAKTO*
- bultenon TEJO Tutmonde (oficiala organo de TEJO)
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

## Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Korespondanta Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonas viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Korespondanta Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio**

## JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 4-foje jare (marto, junio, septembro, decembro) sur 28 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

**Karakterizas ĝin:**

**modela stilo kaj facila lingvaĵo** (1500 vortradikoj sen glosoj), **enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkultura, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.**

**JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.**

**Vizitu nian TTT-ejon: <www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>**

## Kiel sendi kontribuojn al KONTAKTO?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do **ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!**
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodigon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la Interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

## Kotiztabelo de UEA por 2005

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/eŭro	4	11	28	17	10	56
Aŭstralio/dolaro	15	38	94	56	34	188
Aŭstrio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Belgio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Brazilo/eŭro	4	11	28	17	10	56
Britio/pundo	6	15	37	23	14	74
Bulgario/eŭro	4	11	28	17	10	56
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	65	165	410	260	155	820
Finlando/eŭro	9	22	55	35	21	110
Francio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Germanio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Greklando/eŭro	9	22	55	35	21	110
Hispanio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Hungario/forinto	1500	3700	9200	5800	3500	18400
Irlando/eŭro	9	22	55	35	21	110
Islando/eŭro	9	22	55	35	20	110
Israelo/eŭro	7	18	44	26	16	88
Italio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Japanio/eno	1200	2900	7300	4400	2600	14600
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Malto/eŭro	6	15	37	23	14	74
Nederlando/eŭro	9	22	55	35	21	110
Norvegio/krono	75	185	460	275	165	920
Nov-Zelando/dolaro	17	44	109	65	39	218
Pollando/eŭro	4	11	28	18	11	56
Portugalo/eŭro	9	22	55	35	21	110
Rusio/eŭro	4	11	28	17	10	56
Slovakio/krono	200	550	1400	900	550	2800
Svedio/krono	80	200	500	320	190	1000
Svislando/franko	14	34	85	51	31	170
Usono/dolaro	10	25	62	37	22	124
TARIFO A/eŭro	6	15	37	22	13	74
TARIFO B/eŭro	4	11	28	17	10	56

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Estonio, Latvio, Litovio kaj Slovenio laŭ Pollando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Mallongigoj:

**MG** – Membro kun Gvidlibro

**MJ** – Membro kun Jarlibro

**MJT** – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

**MA** – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

**MA-T** – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

**SA** – Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

**Kto** – Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

**SZ** – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membreco)

**PT** – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO Tutmonde*)

**DM** – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

**DMJ** – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

**Kiel individuaj membroj de TEJO** (MJ-T aŭ MA-T) por 2005 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2005 (t. e. kiuj naskiĝis en 1975 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

**Eblas abonati** ankaŭ al *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

**Oni povas pagi** pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per giro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

**KONTAKTO:** Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 205** (2005:1), 42-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo:** <http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd., Alpharetta GA 30004, Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro:** Eugenia ZVEREVA (Ukrainio). **Vic-redaktoro:** Joel AMIS (Usono). **Ĉef-korektisto:** Paŭlo MOJAJEV (Ukrainio) **Kovrilo:** Aleksej KOBZENKO. **Presado:** SKONPRES, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel AMIS (Usono), Jojo (Piklando/Mordio), Tatjana AUDERSKAJA (Ukrainio), Giancarlo BARALDI (Italio), Morteza MIRBAGHIAN (Irano), Paŭlo MOJAJEV (Ukrainio), SALIKO, (Finlando), Behrouz Soroushian (Irano/Francio). **Facilingvaj artikoloj** estas verkita en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujara. **Anonctarifoj:** Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleradon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anonctoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22.00/21/13 715; <http://216.138.240.229/rc4> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es\_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). *Pola Radio:* elsendoj:13:30/41,23/7 275; ripetoj: 18:00/42.07/7 130; 20:00 kaj 9:30 sekvan tagon (nur per satelito). La satelita ricevo eblas per: Eutelsat II F – 6 – Hot Bird – 13 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. <http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>, <http://www.radio.com.pl/polina/esperanto\_eo.asp>, <http://start.at/retradio> **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

# Kiel verki per facila lingvaĵo por



Kiam vi verkas por komencantoj, eble vi pensas: "Mi devas uzi facilan lingvaĵon. Kion mi povas diri per ĝi?" Provu pensi anstataŭe: "**Mi volas komuniki ion. Kiel mi povas esprimi ĝin per facila lingvaĵo?**"

Eble vi trovos dum la verkado, ke estas pli facile unue verki la artikolon per normala lingvaĵo kaj poste simpligi ĝin. Ankaŭ la redaktoro povas pli facile simpligi vian interesan artikolon, ol aldoni intereson al facillingva, sed banala artikolo. Se vi ne sukcesas sufiĉe simpligi la lingvaĵon, tamen sendu vian artikolon!

La redaktoro rezervas al si la rajton laŭnecese korekti, mallongigi kaj simpligi artikolojn.

**Facileco:** La facillingvaj artikoloj de *KONTAKTO* aperas en du niveloj:

**Tre facila:** Uzu nur tiujn elementojn de la listo, kiuj aperas grase presitaj, plus tiujn de **Aldone**. Se vi deziras uzi alian radikon, necesas klarigi ĝin en la artikolo mem aŭ aldoni piednoton.

**Facila:** Vi rajtas uzi ĉiujn elementojn de la listo. Aliajn necesas klarigi.

**Longeco:** Verku ne tro longan artikolon! Prefere ĝi ne enhavu pli ol 800 vortojn. Se vi opinias, ke tio ne sufiĉas, verku pri unu aspekto de via temo pli profunde.

**Stilo:** Uzu simplajn frazstrukturajn kun kutima vortordo. Evitu pezajn kunmetaĵojn. Prefere ne uzu verban substantivon, se eblas uzi verbon anstataŭe.

**Gramatiko:** Je la nivelo **Facila** jam estas uzata la tuta baza gramatiko. Je la nivelo **Tre Facila** oni nje uzas la participojn (krom la substantiva finaĵo -anto, necesa en vortoj kiel leganto, prezidanto).

**Nomoj:** Vi rajtas libere uzi nomojn de landoj, lingvoj, popoloj kaj urboj. Ne Esperantigu propran nomon, sed uzu Esperantan nomon nur se ĝi jam ekzistas! Prefere uzu nacilingvan (latinalfabetan) formon, kaj aldonu inter krampoj la prononcon.

**Aldone** uzblas ĉiuj oficialaj afiksoj, gramatikaj finaĵoj, korelativoj, pronomoj, tag- kaj monatomoj, numeraloj, kunmetitaj vortoj formitaj el la listigitaj elementoj kaj la plej konataj mallongigoj.

**Abon-** acet-  
**adres-** aer-  
**afabl-** afer-  
**ag-** agrabl-  
**ag-** agrabl-  
**ajn** **akcept-**  
**akr-** aktiv-  
**akv-** al-  
**al-** almenaŭ  
**alt-** am-  
**am-** amas-  
**ambaŭ** **amik-**  
**amuz-** angul-  
**angul-** anim-  
**ankaŭ** **ankoraŭ**  
**anonc-** **anstataŭ**  
**antaŭ** aparat-  
**apart-** aparten-  
**aparten-** apenaŭ  
**aper-** apud  
**apud** aranĝ-  
**arb-** art-  
**artikol-** asoci-  
**asoci-** aspekt-  
**aspekt-** atak-  
**atak-** atend-  
**atent-** ating-  
**ating-** aŭ  
**aŭ-** aŭd-  
**aŭd-** aŭskult-  
**aŭskult-** aŭtobus-  
**aŭtobus-** aŭt(omo-  
**bil)-** aŭtun-  
**aŭtun-** av-  
**av-** azen-

**Ĉef-** ĉemiz-  
**ĉes-** ĉeval-  
**ĉi-** ĉiel-  
**ĉirkaŭ** **ĉu**

**Da** danc-  
**danc-** danĝer-  
**dank-** dank-  
**daŭr-** de  
**de-** decid-  
**defend-** defend-  
**dekstr-** demand-  
**demand-** dens-  
**dent-** desegn-  
**desegn-** detal-  
**detal-** dev-  
**dev-** dezir-  
**dezir-** di-  
**di-** diferenc-  
**diferenc-** difin-  
**dik-** dir-  
**dir-** direkt-  
**direkt-** disk-  
**disk-** diskut-  
**divers-** divers-  
**divers-** divid-  
**divid-** do  
**do-** doktor-  
**doktor-** doĉ-  
**doĉ-** dolor-  
**dolor-** dom-  
**dom-** domaĝ-  
**domaĝ-** don-  
**don-** donac-  
**donac-** dorm-  
**dorm-** dors-  
**dors-** drat-  
**drat-** dub-  
**dub-** dum  
**dum-** dung-

**Eben-** ec-  
**eduk-** edz-  
**edz-** efektiv-  
**efektiv-** egal-  
**egal-** ekonomi-  
**ekonomi-** ekskurs-  
**ekskurs-** ekspozici-  
**ekster-** ekzamen-  
**ekzamen-** ekzempl-  
**ekzempl-** ekzerc-  
**ekzerc-** ekzist-  
**ekzist-** el  
**el-** elekt-  
**elekt-** elektr-  
**elektr-** emoci-  
**emoci-** en  
**en-** energi-  
**energi-** erar-  
**erar-** esper-  
**esper-** esplor-  
**esplor-** esprim-  
**esprim-** est-  
**est-** estim-  
**estim-** eventual-  
**eventual-** evolu-

**Ĝaj-** gajn-  
**gajn-** gas-  
**gas-** gast-  
**gast-** gazet-  
**gazet-** glaci-  
**glaci-** glit-  
**glit-** grand-  
**grand-** gras-  
**gras-** gratul-  
**gratul-** grav-  
**grav-** gren-  
**gren-** griz-  
**griz-** grup-  
**grup-** gust-  
**gust-** gvid-

**Garden-** gen-  
**gen-** general-  
**general-** gentil-  
**gentil-** ĝis  
**ĝis-** ĝoj-  
**ĝoj-** ĝu-  
**ĝu-** ĝust-

ha halt-  
**halt-** har-  
**har-** haŭt-  
**haŭt-** hav-  
**hav-** haven-  
**haven-** hejm-  
**hejm-** hel-  
**hel-** herb-  
**herb-** hieraŭ  
**hieraŭ** histori-  
**histori-** hodiaŭ  
**hodiaŭ** hom-  
**hom-** horlog-  
**horlog-** hotel-  
**hotel-** hund-

**Ide-** ideal-  
**ideal-** imag-  
**imag-** imit-  
**imit-** industri-  
**industi-** infan-  
**infan-** inform-  
**inform-** insekt-  
**insekt-** insign-  
**insign-** instru-  
**instru-** insul-  
**insul-** inteligent-  
**inteligent-** intenc-  
**intenc-** inter-  
**inter-** interes-  
**interes-** intern-  
**intern-** invit-  
**invit-** ir-

**Ja** jam  
**jam** jar-  
**jar-** je  
**je-** jen  
**jen** jes

**Jug-** jun-  
**jun-** jup-  
**jup-** just-

**Ĵet-** ĵus

kadr-  
**kaf-** kaf-  
**kaj-** kaj-  
**kajer-** kalendar-  
**kalendar-** kalkul-  
**kalkul-** kamp-  
**kamp-** kant-  
**kant-** kap-  
**kap-** kapabl-  
**kapt-** kar-  
**kar-** karb-  
**karb-** kart-  
**kart-** kased-  
**kased-** kaŝ-  
**kaŝ-** kat-  
**kaŭz-** kaz-  
**kaz-** ke  
**ke-** kelk-  
**kelk-** kilogram-  
**kilogram-** kilometr-  
**kilometr-** kis-  
**klar-** klas-  
**klas-** klin-  
**klopod-** klub-  
**klub-** knob-  
**kol-** kolekt-  
**kolekt-** koler-  
**kolor-** komb-  
**komenc-** komerc-  
**komerc-** komfort-  
**komfort-** komisi-  
**komitat-** kompar-  
**kompat-** kompren-  
**kompren-** komput-  
**komun-** komunik-  
**kon-** koncern-  
**koncern-** kondiĉ-  
**kondiĉ-** konduk-  
**kongres-** konkret-  
**konkret-** konsent-  
**konserv-** konsider-  
**konsil-** konsist-  
**konst-** konstru-  
**konstru-** kontakt-  
**kontakt-** kontent-  
**kontent-** kontraŭ  
**kontrol-** konven-  
**konven-** konvink-  
**kopi-** kor-  
**kor-** korb-  
**korespond-** korp-  
**kort-** kost-  
**kost-** kostum-  
**kovert-** kovr-  
**krajon-** kre-  
**kred-** kresk-  
**kresk-** kri-  
**krom-** kruel-  
**krud-** kudr-  
**kuir-** kuk-  
**kuler-** kulp-  
**kultur-** kun-  
**kupon-** kur-  
**kurac-** kurag-

**Kurs-** kuŝ-  
**kutim-** kuz-  
**kvadrat-** kvalit-  
**kvankam** kvant-  
**kvazaŭ**

**La** labor-  
**lac-** lag-  
**lakt-** land-  
**lang-** lang-  
**larg-** las-  
**last-** laŭ  
**lav-** lecion-  
**leg-** legom-  
**leg-** lern-  
**lert-** leter-  
**lev-** liber-  
**lib-** lig-  
**lign-** lim-  
**lingv-** lini-  
**lip-** list-  
**lit-** liter-  
**literatur-** log-  
**lok-** long-  
**lud-** lum-  
**lun-**

**Mian-** mang-  
**manier-** mank-  
**mank-** mantel-  
**mar-** mark-  
**mar-** mars-  
**mastr-** maŝin-  
**maten-** material-  
**mebl-** medi-  
**mem-** membr-  
**memor-** mend-  
**mens-** merit-  
**met-** met-  
**met-** metal-  
**metod-** metr-  
**mez-** mezur-  
**miks-** milit-  
**minus-** minut-  
**mir-** modern-  
**mok-** mom-  
**moment-** mon-  
**monat-** mond-  
**mond-** mont-  
**mont-** morgaŭ  
**mort-** mov-  
**mult-** mur-  
**muŝ-** muze-  
**muzik-**

**ne** nebul-  
**neces-** neg-  
**nek-** nep-  
**nepr-** neŭtral-  
**nev-** nigr-  
**nivel-** nokt-  
**nom-** nombr-  
**nord-** normal-  
**not-** nov-  
**nu-** nub-  
**num-** numer-  
**nun-** nur

**Objekt-** odor-  
**ofic-** oft-  
**okaz-** okcident-  
**okul-** okup-  
**ol-** ole-  
**onkl-** opini-  
**or-** ord-  
**ordinar-** ordon-  
**orel-** organiz-  
**orient-** original-  
**ost-** ov-

**Pac-** pag-  
**pag-** pak-  
**pur-** palp-  
**pan-** pantalon-  
**pardon-** park-  
**parol-** part-  
**part-** pas-  
**paŝ-** patr-  
**pec-** pen-  
**pend-** pens-  
**pentr-** per-  
**per-** perfekt-  
**period-** permes-  
**permes-** person-  
**pez-** pied-  
**pik-** pilk-  
**plac-** plafon-  
**plan-** plank-  
**plant-** plast-  
**plej-** plend-  
**plenzur-** pli  
**plor-** plu-  
**plum-** plur-  
**plus-** pluv-  
**po-** poem-  
**poent-** poezi-  
**polic-** politik-

**popol-** popular-  
**por-** port-  
**post-** postul-  
**poŝ-** pot-  
**pov-** praktik-  
**prav-** precip-  
**prefer-** preĝ-  
**preleg-** prem-  
**premi-** pren-  
**prepar-** pres-  
**preskaŭ** pret-  
**preter-** prez-  
**prezid-** pri  
**princip-** printemp-  
**pro-** problem-  
**produkt-** profund-  
**program-** progres-  
**proksim-** promen-  
**promes-** propon-  
**prov-** prov-  
**prunt-** publik-  
**pun-** punkt-  
**pup-** pup-  
**pur-** pur-  
**puŝ-**

**Rad-** radi-  
**rakont-** rand-  
**rang-** rapid-  
**raport-** redakt-  
**reg-** region-  
**regul-** reg-  
**reklam-** rekomend-  
**rekt-** relig-  
**renkont-** respond-  
**rest-** revu-  
**ricev-** ric-  
**rid-** rigard-  
**rilat-** rimark-  
**rimed-** ripet-  
**ripet-** river-  
**rizer-** rob-  
**roman-** romp-  
**romp-** rond-  
**roz-** rubrik-  
**rug-** rul-

**Sag-** sak-  
**sal-** salon-  
**salt-** salut-  
**salut-** sam-

**san-** sang-  
**sankt-** sankt-  
**sat-** sav-  
**sci-** sci-  
**scienc-** se  
**sed** seg-  
**sek-** sekretari-  
**seks-** seks-  
**sekv-** semajn-  
**sen-** senc-  
**send-** sent-  
**serĉ-** serioz-  
**serv-** sezon-  
**sid-** sign-  
**signif-** silent-  
**simil-** simpl-  
**sinjor-** sistem-  
**situaci-** skatol-  
**skrib-** soci-  
**soif-** sol-  
**soldat-** solv-  
**somer-** son-  
**spec-** special-  
**spedul-** spegul-  
**sport-** spert-  
**spez-** spic-  
**spir-** spirit-  
**staci-** star-  
**stat-** stel-  
**strang-** strat-  
**streĉ-** stud-  
**stult-** sub-  
**sub-** subit-  
**sud-** sufer-  
**sufic-** sukces-  
**sukces-** suker-  
**sum-** sun-  
**super-** supoz-  
**supr-** sur

**Saf-** ŝajn-  
**ŝanc-** ŝang-  
**ŝat-** ŝerc-  
**ŝip-** ŝir-  
**ŝlos-** ŝnur-  
**ŝrank-** ŝtat-  
**ŝtel-** ŝtof-  
**ŝton-** ŝtrump-  
**ŝtup-** ŝu-

**Tabl-** tabul-  
**tag-** tamen  
**tas-** task-  
**taŭg-** te-

**teatr-** tegment-  
**tekst-** telefon-  
**telev-** televid-  
**tem-** temp-  
**ten-** teori-  
**ter-** terur-  
**terur-** tim-  
**tir-** tond-  
**tra-** tradici-  
**traduk-** traf-  
**trakt-** tranĉ-  
**tranĉ-** trankvil-  
**trans-** tre  
**trink-** tro  
**tro-** trov-  
**tru-** tuk-  
**turism-** turist-  
**turist-** tur-  
**tuŝ-** tut-

**Universal-** universi-  
**tat-** urb-  
**util-** util-  
**uz-**

**Vagin-** valid-  
**valor-** varm-  
**vast-** vek-  
**ven-** venk-  
**vent-** verd-  
**verk-** vesper-  
**vest-** veter-  
**vetur-** viand-  
**vic-** vid-  
**vigli-** vilaĝ-  
**vin-** vintr-  
**vir-** viŝ-  
**vit-** viv-  
**vizag-** vizit-  
**voĉ-** voĉ-  
**voj-** vojaĝ-  
**vojag-** vok-  
**vol-** vol-  
**vort-** vort-  
**vost-**

**Zorg-**

Pri ajnaj demandoj kontaktu la redakcion!